

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Flandraj
esperantistoj
sin turnas
devige eksteren**



**Lipari pri
demokratieco
kaj publikeco**



**Kaj tamen
ne dormas
la Akademio**



Teame por Kampanjo 2000

Enhavo

- 61 Eŭropo: Leĝa devigo trarompi la izolon (Ivo Durwael)
- 62 Kampanjo 2000 por internacia lingva ordo (Renato Corsetti, LEE Chong-Yeong)
- 64 Afriko: UTE enpafas golojn (Raoul K. Hounnake); Brikon post briko; Zamenhof-tago per ceporikolto (Malende Lutete); Interinsulaj klopodoj
- 66 La membraro de UEA en 1996
- 67 Komunikado de la ĝenerala sekretario: Demokratieco kaj publikeco (Michela Lipari)
Fondaĵoj: Ne tute forlasitaj (Hans Bakker)
Apogo de EP-estro
- 68 Teatro: La voĉo el Havano (intervjuo kun Georgina Almanza)
- 69 Forumo: Ĉu ni konstruos novan ŝtupon? (Zlatko Tišljarić)
- 70 Akademio de Esperanto: La Akademio ne dormemas (Aldo de' Giorgi); *Euro, graffiti, Alsace/Elsass*: Provizoraj rezultoj (Bernard Golden)
- 72 Recenzoj: *Ruĝdoma sonĝo* (MAO Zifu); *Madjaroj (hungaroj) en Vojvodino* (Renato Corsetti); *La armeoj de Paluzie* (Antonio Valén); *Neniu povas ŝanĝi hieraŭon*; *Pluralogo*; *Vino, viroj kaj kanto* (Franz-Georg Rössler)
- 74 Foliume
- 75 Laste aperis
- 76 Reagoj: Unuavice UK-anoj (Perla Martinelli); Juĝo hasta kaj scienca (Marjorie Boulton); Zamenhof: Diletanto aŭ genio? (Maurice Sujet); Artverko, ne mekanika kunmetaĵo (Boris Kolker); Ne la sola mispaŝo (Piet Cleij); La kimero de goldena posedo (Usui Hiroyuki); Konsolo el Italio (Aldo de' Giorgi); Ideojn havas homoj, ne lingvoj (Detlev Blanke)
- 78 Loke – Persone
- 79 Oficiala informilo; Nekrologoj: Li Hajpin (1917-1997)

Vi trovos

en la “vitrino” de ĉi tiu revuo (p. 62-64) labordokumenton pri Kampanjo 2000 por la internacia lingva ordo, kampanjo pri kiu vi jam povis legi en pasaj mencioj de nia revuo. Malsame ol objektojn en vendejaj vitrinoj, ĉi tiun tekston vi rajtas ne nur tuŝi, sed vi estas eĉ invitita prilabori ĝin, donante viajn komentojn. La dokumento intencas doni gvidliniojn al movado transpaŝanta tiun sojlan jaron 2000 kiu, ŝajnta scienc-fikciaĵo antaŭ kelkaj jardekoj, fariĝas nun palpe proksima...

La statistiko pri la membraro de UEA en 1996 (p. 66) atestas pri daŭrado de la modesta kresko spertita en 1995. Cetere, tia statistiko neniam povas esti definitiva: je redaktotempo venis plua kotizo por 1996. Fakte, nenio malhelpas ke, se vi ne estis membro en iu pasinta jaro, vi “retropagu” ties kotizon kaj ricevui, ekzemple, ĉiujn numerojn de nia revuo el la koncerna jaro!

La kovrilo: Fotita de la profesia fotisto ASSIONGBON Kankoégan Hilaire, bildo de la togolanda piedpilka teamo Esperanto (ĉiujn teamanojn vidu sur p. 64) memorigu al ni ke grandajn trafajn ebligas nur ĉiu-era teama kunlaboro.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktotempo: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). **Establa** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kosta 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2000, 1/2 p. 1100, 1/4 p. 600, 1/8 p. 330, 1/16 p. 180. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kosta duoble. Rabato por tuj ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefaksa: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ✉ +82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ✉ +39-6-39-72-61-69; ✉ mc8750@mcclink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ✉ +31-50-3613763 [of]; ✉ a.f.de.geus@td.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ✉ +1-613-565-9279; ✉ mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ✉ +370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ✉ +972-2-658-4437 [of]; ✉ amri@vms.huji.ac.il.

Leĝa devigo trarompi la izolon

Flandra Esperanto-Ligo (FEL) havas propran centron en Antverpeno kun 7 pagataj oficistoj. Kiel eblas agado tiel altnivela kompare kun la nombro de esperantistoj en Flandrio, kaj kiel ŝanĝigas tie la kondiĉoj nun? La sekretario de FEL klarigas.


En la centro de FEL plentempe laboras nur 3 oficistoj, tamen la kuna deĵortempo de ĉiuj dungitoj egalas al 5 postenoj tuttempaj. Altaj ciferoj kompare al la nombro de la esperantistoj en Flandrio (FEL havas ĉ. 420 membrojn), des pli ke la kotizo de FEL estas surprize pli malalta ol tiu de E-asocioj en la najbaraj landoj. Vivteni tian centron eblas nur dank' al enspezigaj agadoj — precipe la eldono de la internacia magazino *Monato* kaj de libroj — kaj al ŝtataj subvencioj.

Ekde sia fondiĝo FEL ricevas konsiderindajn subvenciojn de la kulturministerio, unue belga kaj — post la federaciigo de Belgio — nun flandra. Tamen ĉiujare la estraro kaj la oficistaro havas zorgojn pri la ekvilibro de la bilanco. La ministeria subvencio egalas proksimume la salajron de la direktoro. Se tiu sumo forfalas, supozeble la centro kolapsus. Oni povus pensi ke tiam sufiĉus maldungi unu oficiston. Tamen, foriro de unu persono povus tiom damaĝi la enspezigajn agadojn ke la tuta asocio riskus rapide bankroti.

La flandra situacio estas beno sed samtempe enhavas grandan riskon. Ĝis 1995 FEL ricevis subvenciojn surbaze de la pruvitaj agadoj de la centro kaj de la diversaj lokaj grupoj kune. En aprilo 1995 la flandra registaro voĉdonis novajn dekretojn pri la subvencio de sociaj-kulturaj asocioj, starigante kiel kondiĉon de subvencio por ĉiu agad-formo ke tiu estu alirebla por la ĝenerala publiko, ne nur por "fermita rondo". Sekve, se FEL volas gardi la subvencion ekz. por la kunvenoj de siaj kluboj, tiuj devas zorgi pri traduko aŭ resumo en la nederlandan. (Tiu regulo ne estas nova, sed pli frue sufiĉis raporti post la kunveno; nun necesas antaŭanonci publikajn kunvenojn, kaj foje povas aperi en ili inspektoro.)

La nunaj normoj ebligas al FEL esti rekonata kiel kultura asocio nur se ĝi kapablas disponigi servojn al aliaj sociaj-kulturaj asocioj, institutoj aŭ

instancoj, kio necesigas transformon de la asocio. La estraro longe pristudis la problemon. Ĝi proponis statutsanĝon, kiun la ĝenerala membrakunveno akceptis. Post la kutimaj



La sidejo de Flandra E-Ligo en Antverpeno (el la revuo *Horizontaal*)

celdifinoj — informi pri Esperanto, instrui kaj apliki ĝin, strebi al plibonigo de la internaciaj rilatoj — aldoniĝis la mencio ke FEL volas atingi tion ĉefe per la disponigo de siaj servoj al aliaj organizaĵoj, instancoj, institutoj kaj individuoj. Sed difini tion en statuto ne sufiĉas. Ni devas ankaŭ prui tion. Feliĉe, la dekreto antaŭvidis 3 transirajn jarojn por adaptiĝo al la nova situacio.

FEL troviĝis antaŭ granda defio. Ju pli frue ĝi komencos novan agadstrategion, des pli granda estos ĝia ŝanco sukcesi. Ni konsciis ke la nova

situacio devigas nin trarompi tendencojn ĝeneralan en eŭropaj Esperanto-asocioj: mi pensas pri la inklino enfermi sin en propran rondon kaj dediĉi la disponeblajn tempon kaj energion preskaŭ nur al la vivteno de agadoj por la membroj. FEL ja havas belan tradicion de rilatado kun amaskomunikiloj kaj kun neesperantistaj organizaĵoj. Sed en la jaro 1996 ni disponigis niajn servojn — informante aŭ organizante prelegojn kaj kursojn — jam al 2 kulturcentroj, 2 bibliotekoj, 7 lernejoj kaj 17 kulturaj asocioj.

Mi aktivas de post 1960, sed mi havas la impreson ke neniam antaŭe ni rilatis kun tiom da asocioj. Restas la konstanta devo ĉiujare agadi simile. Malgraŭ aro da organizaĵoj kaj precipe administraj problemoj, la nova situacio donis renovigan impulson. Montriĝas ke la strebo por organizi agadojn pri Esperanto en la kadro de aliaj asocioj havas multajn avantagojn: ni atingas novan publikon; ni ŝparas multe da mono kaj energio, ĉar ni lasas la zorgojn pri informado kaj organizado al aliaj homoj; tiuj organizaĵoj disponigas ofte pli favorajn kondiĉojn ol ni kutimas: modernajn, bone ekipitajn prelegejojn kaj klasĉambrojn, kompenson por prelegantoj aŭ instruistoj; la etoso de formortinta movado malpliĝas ktp.

Kiel ni akiras tiujn kontaktojn? Ni proponas al la aktivuloj en lokaj kluboj peti la liston de ĉiuj kulturassocioj en sia komunumo. Ni sisteme provas kontakti la organizantojn de prelegoj, kursoj, debatoj ktp. Ni informas pri tio kion ni — t.e. la loka grupo kaj/aŭ la Esperanto-centro — povas kunorganizi. El tiuj kontaktoj povas estiĝi novaj, ĉar gvidantoj de asocioj ofte havas rilatojn kun aliaj grupoj. Tiel, ni esperas, iom post iom Esperanto fariĝos pli konata en la kulturemaj medioj de Flandrio.

Ĉu la sperto de FEL inspiras aliajn aktivulojn ne atendi iun oficialan premon, sed tuj ŝanĝi sian agadpolitikon?

Ivo Durwael

Sekretario de Flandra Esperanto-Ligo

Kampanjo 2000 por in


Por difini la celojn kaj manierojn de Kampanjo 2000, la Komitato taskis al grupo de aktivuloj verki bazan dokumenton, diskutotan en la Adelajda UK. Jen ĝisdata versio de tiu teksto, kiu jam konsideras proponojn de landaj asocioj kaj komitatanoj ĝin pristudintaj, sed ne estas definitiva. Ĉies komentoj estas bonvenaj.

Premiso 1: En la lastaj jaroj la Esperanto-movado spertis serion da sukcesoj en kelkaj medioj/landoj kaj alfrontis serion da problemoj en aliaj. Kvankam ĝenerale ekzistas pli serioza sinteno al Esperanto, la konscivnivele de la ĝenerala socio rilate al demokrata solvo de lingvaj problemoj ankoraŭ ne estas kontentiga. Aliflanke la organiza (idea kaj laborforta) stato de Esperanto-organizaĵoj ne atingas la dezirindan nivelon, tiel ke ankaŭ eventualaj sukcesoj je la nivelo de parlamentoj aŭ internaciaj organizaĵoj riskas resti vanaj pro la malebleco por niaj organizaĵoj efektiviĝi la necesajn paŝojn por ekspluati tiujn favorajn kondiĉojn. En pluraj landoj la laborfortoj kaj laboraj rimedoj de niaj organizaĵoj ne kreskas aŭ en kelkaj kazoj eĉ falas; la instruado kaj lernado de Esperanto bezonas novan impulson en formo de novaj lerniloj kaj pli efika aliro al la publiko; kaj la merkato de Esperanto ne utiligas aktualajn metodojn. En aliaj landoj okazis tamen sukcesoj, kiujn ni devas ĝeneralligi al tiuj landoj kie ili forestis.

Premiso 2: La konscio pri la fakto ke lingvaj rajtoj estas parto de la homaj rajtoj, progresas en kelkaj lokoj kaj en kelkaj tavoloj de iuj socioj, sed en la praktiko la solvo al komunikaj problemoj restas ankoraŭ ligita al tradicia kaj nedemokratia sistemo. Multa informa laboro estas bezonata por vaste konsciigi la homaron pri la neceso de nova aliro al lingvaj demandoj, aliro kies konstitua parto estu la internacia lingvo Esperanto, kaj kiu celu la respekton de ĉiuj lingvoj kaj de ĉiuj kulturoj. Por aliri tiun tutan kampon nepre antaŭkondiĉo estas zorga analizado de la potencfluo kaj tendencoj en la nuntempa mondo kiuj decide influas la lingvopolitikon de ŝtatoj, interŝtataj unuiĝoj kaj internaciaj organizaĵoj (fakaj, profesiaj, sciencaj kaj aliaj) kaj — ne laste — la sintenon de la ĝenerala publiko al fremdaj lingvoj. Samtempe oni devas sobre analizi la nunan staton de la Esperanto-movado por fiksi celojn vere atingeblajn. Por respondi al la defioj kiujn la nuna mondo prezentas al la Esperanto-movado, UEA lanĉas la kampanjon ĉi-sekve priskribitan.

Ĝeneralaj celoj

1. Levi la organizon kaj idean nivelon de la Esperanto-komunumo.
2. Levi la prestiĝon de la internacia lingvo.
3. Influi la internacian vivon.



Kampanjo 2000 petas ĉiun esperantiston pliintensigi sian lokan agadon jam faratan. En Maracaibo (Venezuelo) okazis 100 E-kursoj ekde 1976. La lastan gvidis prof. David G. Valecillos V., kiu sendis ĉi tiun foton.

Detalado de la celoj kaj prioritataj taskoj

La unua celo entenas signifan levon de la idea kaj organiza niveloj de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, por igi ilin pretaj alfronti la defiojn de la nova jarmilo. En la praktiko tio signifas ke ĉiu Esperanto-organizaĵo devas zorgi pri akiro de rimedoj homaj kaj financaj. Tio en si mem ne alportos la finan venkon, sed estas la premo por havi pli da aktivuloj, pli da influhavaj kaj laborpretaj intelektuloj, kio siavice ebligas al la organizaĵoj iĝi pli stabilaj kaj malpli dependaj de individuoj. Samtempe oni klopodu levi la idean nivelon de la movado per klerigado de la membroj pere de seminarioj, revuoj, renkontiĝoj, por ke ili posedu almenaŭ la bazajn sciojn pri la movado kaj pri ties celoj. Ni ne forgesu, laste, igi niajn labormetodojn kongruaj kun la modernaj teknikaj rimedoj.

Prioritataj taskoj:

— La komitatanoj de UEA iĝu kunrespondecaj por la plenumo de ĉi tiu plano en sia lando, organizaĵo aŭ medio.

— Ĉiu landa kaj faka organizaĵo difinu por si mem kaj por siaj lokaj aŭ alispekaj subgrupoj konkretan cel-grupon varbotan kaj konkretan membronombron atingindan, kaj ĝi ekagu laŭ tiuj celoj.

— Ĉiu landa kaj faka organizaĵo pretigu programon de klerigaj okazoj por siaj membroj. Tiuj okazoj povus variu laŭ la apartaj kondiĉoj, sed ili devas antaŭvidi la neceson ke ĉiu (nova) membro estu almenaŭ informata pri la historio de la Esperanto-movado, pri ĝiaj nunaj konsisto kaj

Internacia lingva ordo



celoj. (Tiucele estas esence konigi al ĉiu unuopa esperantisto la Manifeston de la Esperanto-movado, kiu ĝis nun estas konata kiel Manifesto de Prago.)

— La Estraro de UEA, kunlabore kun ILEI, reviziu la ekzistantajn instruilojn kun la celo plibonigi la instruadon de Esperanto surbaze de modernaj metodikaj malakovroj, uzante ankaŭ novajn eblojn de komputiloj, elektroteknikaj retoj k. s. kaj zorgante pri la integro de la finstudintoj en la komunumon.

— La landaj organizaĵoj zorgu ke la landaj ILEI-sekcioj estu pli fortaj kaj kunligu ĉiujn instruistojn en la unuopaj landoj.

— La Estraro kaj la financa komisiono de UEA okupiĝu pri financa evoluigo, kaj metu la akiron de mono inter siajn ĉefajn zorgojn.

La dua celo (levi la prestiĝon de la internacia lingvo) invitas al informado pri la internacia lingvo kaj ties seriozaj sociaj celoj, por ke la erara bildo de Esperanto, kiu ankoraŭ ekzistas en multaj medioj, ŝanĝiĝu. Oni devas produkti modernan inform-materialon kaj sisteme sendi ĝin al

instruistoj, lingvistoj, ĵurnalistoj kaj tiuj politikistoj kiuj okupiĝas pri kulturo kaj internaciaj rilatoj, kaj kompreneble al la ĝenerala publiko. Ĝenerale oni celu plibonigi la informadon kaj klerigadon en kaj ekster la komunumo, per stimulado kaj kunordigado de esploroj, eldonaĵoj, klerigaj kaj trejnaj aranĝoj, kaj bone preparitaj prezentoj aŭ kunlaboraj agadoj en diversaj medioj.

Prioritataj taskoj:

— La Estraro de UEA pretigu liston de la plej bonaj informiloj nun ekzistantaj kaj tradukeblaj al la naciaj lingvoj kaj sendu ekzemplerojn de tiuj informiloj al ĉiuj landaj kaj fakaj organizaĵoj.

— La landaj kaj fakaj organizaĵoj prizorgu la tradukon kaj disvastigon de tiuj informiloj al siaj lokaj kaj aliaj grupoj.

— La komitatanoj zorgu ke tiu traduko kaj disvastigo okazu.

— UEA kaj la ceteraj organizaĵoj starigu aŭ/kaj aktivigu informan fakon.

— UEA kaj la landaj kaj fakaj organizaĵoj transiru de pasiva informado (nur al petantoj) al aktiva informado (al la membroj de la homgrupoj supre menciitaj kaj al la ĝenerala publiko).

— La Estraro de UEA donu apartan atenton al la materialo ekzistanta por informi lingvistojn kaj ellaboru, interkonsente kun la taŭgaj instancoj, lingvopolitikon por Esperanto kaj pri esperantologiaj studoj.

La tria celo (influi la internacian vivon): La Esperanto-organizaĵoj de la ĝusta nivelo devas pristudi la eblojn influi la internacian vivon, interalie per internaciaj organizaĵoj, al kiuj oni, post esplorado de la konkretaj kondi-

ĉioj, faru konkretajn proponojn pri kunlaboro.

Prioritataj taskoj:

— La Estraro de UEA konsultiĝu kun antaŭaj kaj nunaj okupiĝantoj pri rilatoj kun UN, Unesko, aliaj organizaĵoj de la UN-familio kaj internaciaj regionaj organizaĵoj (Eŭropa Unio, Organizaĵo pri Afrika Unuiĝo, Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj ktp).

— La Estraro de UEA instigu fakajn Esperanto-organizaĵojn starigi kontaktojn kun internaciaj organizaĵoj kiuj okupiĝas pri sama aŭ apuda temo.

— La Estraro de UEA instigu landajn Esperanto-organizaĵojn starigi kontaktojn kun siaj registaroj kaj tute aparte kun la landaj instancoj kiuj tenas ligojn kun internaciaj organizaĵoj.

— Surbaze de tiuj kaj aliaj zorgaj analizoj kaj preparoj, la Esperanto-organizaĵoj de la ĝusta nivelo kreu kaj flegu kontaktojn kun influaj ekstermovadaj simpatiantoj, starigu pozitivajn kaj konkretajn kunlaborajn rilatojn kun taŭgaj



☞ organizaĵoj, kaj helpe de tiuj kunlaborantoj pretigu kaj akceptigu konkretajn proponojn por ŝanĝi la lingvopolitikon de internaciaj organizaĵoj.

Aliaj rimarkoj

— Ĉi tiu laborplano estas nur kadra laborplano. Ĉiu instanco de la Esperanto-movado fiksos sian propran laborplanon rilate al sia agad-kampo. Estas esence jam nun komenci diskutadon por la detalado de la konkreta laborprogramo de ĉiu partoprenanta instanco.

— Ĉiu organizaĵo en la kazo de traduko al nacia lingvo rajtas traduki la sencon de la esprimo “Por nova internacia lingva ordo” uzante tiujn vortojn kiuj ŝajnos plej akcepteblaj en la nacia lingvo kaj en la nacia medio.

— UEA starigu konton kiu funkcii kiel transira konto por kolekti monon por la realigado de ĉi tiu plano. Ĝi ricevu donacojn de esperantistoj kaj eventuale de neesperantistoj, kaj ĝi transdonu monon al la normalaj kontoj de la administra sistemo laŭ la bezono. La mono, memkompreneble, necesas por la eldonado de informiloj kaj bazaj dokumentoj, por la okazigo de internaciaj seminarioj, por publikaj reklamoj en ĵurnaloj, por sendi volontulajn instruistojn al kelkaj landoj ktp. Por certigi ke la CO per la celata kampanjo ne estu konsiderinde pli ŝargata ol ĝis nun, parto de la kolektitaj rimedoj povos esti uzata por kapabla voluntulo kiu administre subtenu la kampanjon rekte en la CO aŭ sub gvido de elektota oficisto de la CO aŭ de estrarano.

— Kiam temas pri la financoj de la asocio, daŭre validas la konsiloj de la Laborplano 1989-1992. Tiu laborplano esence instigis la respondeculojn pri financoj de la asocio sisteme serĉi monfontojn en kaj ekster la Esperanto-movado, kiel ekzemple grandaj privataj fondaĵoj aŭ mecenatoj, sed ankaŭ eblaj publikaj fontoj, kiel la urbo Roterdamo. En tiu sistema serĉado devas esti kunlaborigataj ankaŭ la landaj asocioj. La celo estas trovi eksteran monon. Tre verŝajne ĝi ne estas trovebla por Kampanjo 2000 kiel tia, sed ja por pluraj el ĝiaj eroj, kiel la klerigaj seminarioj kaj similaj.

— Ĉi tiu laborplano kaj la Manifesto de la Esperanto-movado devas esti daŭre disponeblaj ĉe la CO de UEA kaj vaste dissendataj al Esperanto-organizaĵoj kaj individuaj esperantistoj en ĉia ebla maniero.

— La Estraro de UEA raportu ĉiun jaron al la Komitato pri la progreso de la kampanjo.

— Fina noto: Ĉi tiu laborplano estas intence tre ĝenerala. Ĝi celas instigi ĉiunivelajn Esperanto-organizaĵojn partopreni laŭ siaj eblaj kompetentoj. En la venontaj jaroj, ĝis la jaro 2000, ĉiu devos streĉi siajn fortojn por komune antaŭenporti la internacian lingvon al tiu pli firma pozicio en la mondo dum la venonta jarcento kiun Esperanto meritas.

Ĉi tiu plano rekonas ke la kunlaboro de ĉiu parto de la movado estas esenca. Ĝi estas ankaŭ ebla, ĉar ĉiu esperantisto estas simple petata pliintensigi siajn klopodojn jam faratajn. La tasko de la unuopuloj ne estas zorgi ke Unesko, UN ktp ekuzu Esperanton, sed plifortigi sian lokan agadon. Tio estas la plej bona maniero apogi la klopodojn kiujn aliaj faras ĉe tiuj instancoj.

*Renato Corsetti por la Komitato de UEA
LEE Chong-Yeong por la Estraro de UEA*

AFRIKO

UTE enpafas golojn

La Kvara Togolanda E-Kongreso (26-29 dec., Vogan) povis rerigardi al jaroj plenaj de aktiveco en unu el la movade plej fortaj landoj de Afriko.

Sepdekon da geesperantistoj akceptis kolegio en la urbo Vogan. Ne malpli ol dek sekcioj de Unuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE) prezentis siajn jarraportojn, same kiel Junulara Organizo de Togolandaj E-istoj kaj tri aliaj organizoj, kunlaborantaj kun UTE. Rilate al la ĉeftemo, “Utileco de Esperanto”, kongresa rezolucio rekomendis ke “ĉiu e-isto ellernu la lingvon antaŭ ol uzi ĝin por iu ajn celo” kaj por tio “partoprenu kursojn kaj ekzamenojn organizotajn de UTE”, dum “UTE kaj ĝiaj kunlaborantaj organizoj klopodu interesigi kaj profitigi la lingvon al neesperantistoj”. Ne mankis el la kongresa programo distraĵoj kiel matĉo de la futbalteamo Esperanto, venkanta lokan teamon je 2:0, kaj dancado ĝis laciĝo kun neesperantistaj junulinoj el Vogan.

La raporto pri la agado de UTE en 1994-96 prezentas imponan liston de atingiĝoj, el kiuj sekvu kelkaj:

Por helpi al la bona funkciado de kluboj, la estraro starigis grupon de prizorgantoj, kies tasko estas turnei tra la kluboj kaj konsili ilin. Aperis kvin numeroj de la nacia periodaĵo *Alvoko* kaj prepariĝas sesa. Daŭris klopodoj por konstrui Esperanto-Domon, dank’ al helpo de d-ro Thomas A. Goldman (Usono). Dume por kunsidoj kaj kiel ejon de la Biblioteko H. Bakker oni uzas ĉambron luitan. UTE jam plurajn jarojn kunlaboras kun Togolanda Federacio de Unesko-Asocioj kaj -Kluboj (FTACU) kaj reprezentigas en la redaktoteamo de ties bulteno. Post longa planado realiĝis televida programo: preludo al la kongreso, la 22-an de decembro, 30-minuta elsendo de nacia kanalo, “Al vi la parolo”, estis dediĉita al Esperanto.

La laborplano por la venonta jaro antaŭvidas i.a. aperigon de jarlibro kun adresoj de la togolandaj e-istoj, okazigon de aranĝoj komunaj kun FTACU, aliĝon al Federacio de Neŝtataj Organizoj Togolandaj kaj nacian kongreson kiu solenos la 10-jariĝon de UTE (26-31 dec. 1997, Atakpame).

Laŭ raportoj de Raoul K. Hounnake, Sekretario de UTE



Futbalteamo Esperanto ludis en 1996 du matĉojn. La 15-an de dec., kiel raportite (marto, p. 44), ĝi malgajnis je 0:4, kontraŭ la teamo Zafi el Lomé; la 28-an de dec. tamen sekvis venko je 2:0 kontraŭ la teamo de la kongresurbo Vogan.



Foto: Association Kankogan Hilaire

Ekde 1994 togolandaj esperantistoj kongresas ĉiujare.

Brikon post briko

De dek jaroj, franca esperantisto kontaktas kaj helpas zairian korespondanton neniam renkontitan.

Pierre Grollemund, sekretario de la E-asocio en la franca departemento Loire, korespondas ekde 1987 kun Hubert H. Ntawu, juna zairiano. Tiutempe studento, rifuĝinta pro la Mobutu-reĝimo en Tanzanion, Ntawu poste iris al Ugando, de kie li estis reelpelita al Zairio. De ses jaroj li vivas en Goma, zairia urbo ĉe la limo kun Ruando. Krom kultivi teron, li havis la ideon ekprodukti brikojn kaj tegolojn. Por starigi la brikejon grandan helpo donis okazaj monsendoj de Grollemund: sumoj nealtaj por franco sed signifaj en Zairio. En la sukcesa brikfarejo de Ntawu nun kunlaboras du-tri rifuĝintoj el Ruando.

Analizante la lokan situacion en siaj leteroj al Grollemund, Ntawu taksas ke la rifuĝintoj, unuflanke, multe helpas la lokulojn en diversaj sektoroj, sed ke, aliflanke, ilia bezono je hejto-ligno tro ŝargas la medion. Tial li, kiu mem bezonas naŭ kubajn metrojn da ligno por elfari 9000 brikojn monate, planas sisteman replantadon de arboj. Ntawu optimizmas pri la estonteco por sia lando kaj por sia unujara filo Elvis: "Mi esperas ke la malsekureco en la regiono de la Grandaj Lagoj finiĝos kaj la triboj sin intermurdantaj komprenos ke milito estas abomenaĵo."

Zamenhof-tago per ceporikolto

Kion Esperanto povas fari por malsatega popolo kiu de mateno ĝis vespero klopodas trovi por si panon? Unu respondo venas el Zairio.

Lerninte Esperanton, ni akceptis pli grandan respondecon — asertis iam Humphrey Tonkin. Tial ankaŭ ni ne atendis ke unue la situacio en nia lando enordigu; ni ekagis. Ni starigis Agroturisman Esperanto-Rondon por ebligi la praktikon de la lingvo per konkretaj agadoj de la ĉiutaga vivo. AER estas rondo kiu kunigas zairiajn esperantistojn, precipe el la urbo Mbanza-Ngungu, kiuj estas amikoj de agrikulturo, naturo, turismo, kulturo kaj korespondado. Ĝi havas apartajn respondeculojn pri korespondado, turismo kaj agrikulturo.

Dum pli ol jaro da agado AER fariĝis vivanta fenomeno influa en Mbanza-Ngungu. Ĝi havas manioko-kampon kaj cepoĝardenon. Dank' al ĉi ties rikolto, en la Zamenhof-tago de la jaro 1995 AER sukcesis organizi prelegon ĉe supera pedagogia instituto de Mbanza-Ngungu, kun la temo: "Esperanto, cele al monda dimensio". Post la prelego, multaj petis Esperanto-kurson.

AER intencas starigi bibliotekon. Nun ni ricevadas la revuojn *El popola Ĉinio* kaj *Sennaciulo* dank' al itala samideano kiu vizitis Zairion en 1994 kaj iniciatis AER. Al tiuj kiuj amas Afrikon, AER donas okazon partopreni en la progresigado de Esperanto en Zairio, lando kiu estas esperantigebla. Se vi volas scii pli pri niaj celoj kaj agadoj, skribu al: Agroturisma Esperanto-Rondo, B.P. 29, Mbanza-Ngungu, Bas-Zaire, Zairio.

Malende Lutete, Sekretario de AER

Interinsulaj klopodoj

Laŭ raporto de Désiré Rabevazaha, la 1-a Interinsula E-ista Kongreso (25-27 aŭg. 1996) brile sukcesis ĉe la Universitato de Antananarivo (Madagaskaro), malgraŭ ke el eksterlando nur tri esperantistoj venis ĝin partopreni. Ok personoj diplomigis per speciala ekzamen-sesio organizita de Internacia E-Centro, kiu ankaŭ ekspoziciis E-materialojn en la koridoroj de la universitato, konvinkante multajn studentojn eklerni Esperanton. Mikaela Savignat Belhote el Reunio prelegis pri la tiea E-movado kaj deklaris pretecon helpi la E-movadon en Madagaskaro.

Por harmoniigi la disvastigo-strategion de Esperanto en Madagaskaro, kvintaga seminario estas planata por 10-15 aŭgusto 1997, en Manjakandriana. Eksterlandanoj estas bonvenaj. Informas: Justine Ralalarisoa, Lot Nr.7, Mandroseza, MG-101 Antananarivo. ★

La membraro de UEA en 1996

Lando	AM	IM	Sume	Lando	AM	IM	Sume	LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO-STATISTIKO		
Albanio	0	20	20	Kubo	100	35	135	Kategorio	1995	1996
Alĝerio	0	3	3	Latvio	70	35	105	Membro-Gvidlibro	444	403
Angolo	0	4	4	Libio	0	1	1	Membro-Jarlibro	1532	1661
Argentino	85	49	134	Lihtenŝtejno	0	1	1	Membro-Abonanto	3577	3427
Armenio	0	4	4	Litovio	78	44	122	Juna Membro-Jarlibro	410	550
Aŭstralio	140	79	219	Luksemburgio	94	11	105	Juna Membro-Abonanto	310	274
Aŭstrio	57	60	117	Madagaskaro	15	5	20	Dumviva Membro	877	874
Azerbajĝano	0	1	1	Makedonio	45	14	59	Juna Dumviva Membro	19	19
Bangladeŝo	0	1	1	Malio	0	1	1	Honora Membro	57	58
Belgio	557	199	756	Malto	37	3	40	Honora Patrono	11	11
Belizo	0	1	1	Meksiko	38	11	49			
Benino	0	7	7	Moldavio	0	3	3			
Bjlorusio	0	11	11	Mongolio	0	6	6			
Bolivio	0	5	5	Nederlando	284	384	668	Individuaj Membroj	7237	7277
Bosnio-Hercegovino	25	33	58	Nepalo	0	11	11	Aligitaj membroj	11246	10865
Brazilo	183	525	708	Niĝerio	0	20	20	Junaj aligitaj membroj	2562	2449
Britio	684	272	956	Nikaragvo	0	4	4			
Bulgario	586	52	638	Norvegio	309	76	385	Membroj entute	21045	20591
Burundio	0	2	2	Nov-Zelando	32	32	64			
Ĉeĥio	147	144	291	Okcidenta Samoo	0	1	1	Societo Zamenhof	270	250
Ĉilio	25	6	31	Pakistano	50	15	65	Abonoj Esperanto	188	191
Ĉinio	970	170	1140	Panamo	0	1	1	Kolektivaj ab. Eo	82	75
Danio	156	97	253	Papua Novgvineo	0	2	2	Abonoj Kontakto	445	439
Ebura Bordo	25	5	30	Paragvajo	0	1	1	Kolektivaj ab. Kto	542	606
Egiptio	0	1	1	Peruo	25	3	28	Patronoj de TEJO	92	108
Ekvadoro	0	2	2	Pollando	200	191	391	Dumvivaj Patr. de TEJO	12	11
Estonio	56	35	91	Portoriko	0	1	1			
Filipinoj	0	2	2	Portugalia	238	22	260	Kotizoj entute	22676	22271
Finnlando	189	269	458	Ruando	0	1	1			
Francio	403	701	1104	Rumanio	100	53	153	La totala nombro de la individuaj		
Ganao	0	5	5	Rusio	65	212	277	membroj (IM) en 1996 ne multe ŝanĝiĝis		
Germanio	1010	651	1661	Saŭda Arabio	0	1	1	kompare kun la antaŭa jaro (+40). La		
Greklando	258	18	276	Senegalio	0	6	6	efektiva kresko estas tamen pli signifa,		
Gvatemalo	0	5	5	Singapuro	0	7	7	se konsideri ke Fondaĵo Canuto devis		
Haitio	0	1	1	Slovakio	0	48	48	pasintjare malpliigi siajn membrigojn je		
Hinda Unio	100	17	117	Slovenio	100	27	127	ducento, ĉefe inter membroj-abonantoj.		
Hispanio	436	193	629	Srilanko	0	5	5	La influo de UK-oj estas, kiel kutime,		
Honkongo	0	6	6	Sud-Afriko	41	8	49	rimarkebla en la kongresaj landoj. La		
Hungario	440	136	576	Svedio	769	265	1034	ĉeĥa membraro kreskis je 80% (+64),		
Indonezio	0	5	5	Svislando	101	139	240	dum la gastiganto de la UK en 1995,		
Irano	23	58	81	Tagikio	0	2	2	Finnlando, anoncis 54 IM malpli (-17%).		
Irlando	50	15	65	Tajlando	0	2	2	Plej multe la IM-nombro kreskis en Rusio		
Islando	46	37	83	Tanzanio	0	9	9	(+100, 89%), ĉefe dank' al pli aktiva		
Israelo	179	75	254	Togolando	25	12	37	kotizperado.		
Italio	1026	269	1295	Tunizio	0	3	3	La kvanto de aligitaj membroj reduk-		
Japanio	1081	420	1501	Turkio	0	6	6	tiĝis je 494, unuavice pro malkresko en		
Jugoslavio	160	70	230	Ugando	0	1	1	Bulgario (-429). Rimarkindas tamen ke		
Kamboĝo	0	2	2	Ukrainio	106	32	138	la nombro de AM ne ĉiam respektas la		
Kamerunio	0	5	5	Urugvajo	25	8	33	efektivan konsiston de la landaj asocioj,		
Kanado	121	81	202	Usono	666	417	1083	kiuj kelkfoje anoncas nur tiom da mem-		
Kartvelio	0	2	2	Uzbekio	0	6	6	broj por kiom ili povas pagi la kotizon.		
Kazaĥio	0	6	6	Venezuelo	7	18	25	Salutindas la alta nombro de anoj		
Kenjo	0	4	4	Vjetnamio	100	22	122	de Societo Zamenhof, kiu, kvankam		
Kolombio	0	10	10	Zairio	50	13	63	malpli alta ol la rekordo de 1995,		
Kongolando	0	2	2	Zimbabvo	0	1	1	superas konsiderinde la averaĝon de		
Korea Resp.	208	78	286					la lastaj jaroj. Unuafoje la nombro		
Kostariko	0	4	4					de Patronoj de TEJO rekorde transiris		
Kroatio	118	84	202	117 landoj	13314	7277	20591	la limon de 100.		

pz

Demokratieco kaj publikeco

Lastatempe leviĝis voĉoj por “plia demokratia malfermiĝo” de UEA kaj por publikigo de la estraraj protokoloj kaj ĉiuj decidoj, precipe rilate financajn aferojn. Sincere dirite, mi estas iom laca ĉiufoje aparte reagi, ĉar tio forprenas tempon de pli frukto-dona laboro. Jen la kialo de tiu ĉi komuniko.

Ĉiun duan aŭ trian monaton mi cirkuleras al la Komitato de UEA, informante pri pluraj aspektoj de la agado, gravaj kaj malpli gravaj. La CO kaj mi regule respondas al plej diversaj demandoj, ofte mem invitante ilin.

En la CO eblas trovi homon al kiu sin turni, ne nur dum la oficejaj horoj (09h00-17h30 laŭ nederlanda tempo), sed ofte eĉ vespere kaj semajnfine. Ekzemple, la lastan kristnaskon tagmeze mi traktis telefone urgajn aferojn kun la ĝenerala direktoro, normale deĵoranta.

Neniu estrarano aŭ oficisto, nuna aŭ antaŭa, pliriĉiĝis pro sia E-agado. Eblus fari longan liston de estraranoj kiuj

elspezis konsiderindajn sumojn sen peti repagon, kaj de oficistoj kiuj daŭre kromlaboris sen kompenso kaj eĉ rezignis pri salajro-plialtigo favore al sia labordonanto, t.e. ni ĉiuj.

Kiu atente legas la eldonaĵojn de UEA aŭ — se temas pri funkciuloj — aktive partoprenas laborkunsidojn, tiu havas sufiĉe bonan bildon pri la agado de UEA, pri agemo de ĝiaj estraranoj ktp. Se restas malklaraĵoj, oni ĉiam povas leteri por pliaj klarigoj rekte al la koncerna estrarano, oficisto aŭ alia respondeculo.

Ĉio tamen ne povas esti publika, i.a. pro la rajto je privateco, kiu estas forte protektata en Nederlando, sub kies juro UEA funkcias. Mi ne povus permesi ekz. diskonigi la nomojn de la helpitoj el Konto Espero aŭ de la membroj subtenitaj de Fondaĵo Canuto. Pro respekto al la digno de la koncernatoj ne estas dece distrupti helpon kiun oni donas aŭ ricevas. Tamen, ankaŭ tiurilate ĉiuj decidoj estas faritaj de tiuj kiuj estas rajtigitaj

fari ilin. Ekz. pri la helpo el Konto Espero decidas sendependa komisiono. Ĉiuj dokumentoj pri ĝi kaj pri aliaj similaj kontoj kaj fondaĵoj estas kontroleblaj de la Estraro kaj de la revizoroj de UEA.

Mi demandas min kiucele oni faras tiujn postulojn kaj senbazajn akuzojn pri kaŝado de informoj, eĉ insultojn al funkciuloj de nia asocio. Ja ne estas komitatanoj kiuj ilin plej aktive prezentas. Tamen ĝuste la komitatanoj estas elektitaj por direkti la agadon de UEA, difini ĝian politikon, skizi la gvidliniojn kaj kontroli la efektivan realigon de la planitaj aktivaĵoj.

Se ekzistas homoj tiom agemaj, tiom ideoriĉaj, kun tiom da disponebla tempo kaj tiom interesataj pri la vivo kaj farto de UEA, kial ili ne kandidatiĝis por komitataneco? Kial la elektokomisiono havis malfacilaĵojn trovi multajn kandidatojn por estraraj postenoj?

Mi invitas ĉiujn: venu kaj laboru — la pordo estas malfermitaj.

Michela Lipari

Ĝenerala sekretario de UEA

FONDAĴOJ

Ne tute forlasitaj

Ekde 1992, Konto Espero, kiu helpas esperantistajn viktimojn de militoj kaj naturkatastrofoj, estas tre regule nutrata de donacemuloj. La bezono tamen daŭre multoble superas la rimedojn. Jene atestas letero de esperantisto de orienta Zairio.

Kiam vespere mi revenis de la kamparo, mi trovis mian vilaĝon malplena. Ĉiuj panike forfuĝis kaj lasis ĉion. Ankaŭ mi ektimegis kaj tuj forkuris orienten. Mi eskapis el Zairio kaj atingis Tanzanion trans la lago Tanganjiko. La veturo estis riska, sed mi bone alvenis en la regionon Kigoma. Mi feliĉe retrovis mian familion — sed neniun posedaĵon ni havas. Ni dormas sur la tero mem, sen kovriloj. Niaj vestaĵoj estas ŝiritaj, mankas ŝuoj. La manĝaĵo estas malmulta: nur iom da kaĉo, sen legomoj, sen vitaminoj. Mia filo tudas, mia edzino havas dorsodolorojn, mi mem kapdoloradon. Mia filo demandis ĉu mi ne povas peti pantalonon por li ĉe la esperantistoj.

Multaj forlasas ĉi tiun rifuĝejon; ili timas morti se ili restus. Dek membroj

de mia Esperanto-klubo forlasis ĝin kaj volis marŝi al Zambio, 500 km-ojn al sudo. Mia familio ne eltenus tian marŝadon, ni ne plu havas la forton por tio. Malmultaj helporganizaĵoj faras ion. La UN-komisaro por rifuĝintoj faras nenion, nur vizitas por rigardi. La tanzania registaro volas forigi nin el sia lando, sed kien ni iru? Se vi povas sendi esperantaĵojn, tio helpas nin, ĉar mi lasis ĉion en mia vilaĝo, kaj sendube la soldatoj forbruligis ĉion. Per Esperanto ni povas senti nin ne tute forlasitaj. Mi donos ĉi tiun leteron al vizitanto kaj esperas ke li volos ĝin enpoŝtigi por mi.

Kelkaj korespondantoj kaj Fondaĵo Espero disponigis proks. 800 gld. por almenaŭ simbola helpo al fuĝintoj en Tanzanio, Zairio kaj Zambio.

Hans Bakker (Nederlando)

Apogo de EP-estro

Atingis nin kopio de la letero kiun José María Gil-Robles, ekde januaro prezidanto de Eŭropa Parlamento (EP), sendis pasintan decembron al la hispana E-aktivulo A. Martín González (vd. marto, p. 44). La frazoj pro kiuj Germain Pirlot enlistigis la prezidanton inter la EP-anojn diversgrade favorantajn la uzon de Esperanto en EU estas jenaj: “Mi konsentas kun vi pri la avantaĝoj kiujn Esperanto alportas al universala lingva kompreniĝo, tamen mi opinias ke ĝiajn disvastigon kaj konon malfaciligas la fakto ke ĝi ne estas lingvo nature naskiĝinta el la popolo, transdonata de gepatroj al gefiloj. [...] Esperanto povas esti mirinda kompletigo al la kono de diversaj lingvoj, sed hodiaŭ ĝi kapablas anstataŭi neniun el ili. Malgraŭ tio, mi kuraĝigas vin al ĝia disvastigo, kaj mi fidus ke, en ne tro malproksima estonteco, la homaro alvenos al la sole dezirinda lingva kompreniĝo.”

La prezidanto de UEA, LEE Chong-Yeong, sendis gratulleteron al José María Gil-Robles okaze de lia elekto kiel eŭropa parlamentestro. ★

La voĉo el Havano

Kiel promesite, eĉ post la jubilea jaro de la Esperanta teatro ni daŭrigas la prezenton de la verda scenejo. Ĉi-foje, Maritza Gutiérrez intervjuas por ni la aktorinon Georgina Almanza el Kubo.

Kiel vi taksas la influon de Esperanto en via longa kaj sukcesa arta vivo?

Ĝi estas decida en la senco ke mi konsideras E-on la sola komunikilo ekzistanta por ke ĉiuj homoj interrilatiĝu kaj kompreniĝu tute egalrajte.

Kiel vi sukcesas ekvilibrigi du repertuarojn, hispanan kaj Esperantan, same altnivelajn?

Ĉio kion mi atingis, jen multe jen malmulte, dankeblas al miaj konstantaj postuloj al mi mem, ĉar ĉiam mi pripensas kio mankis aŭ kion mi ne sukcesis fari. Artistoj devas esti modesta, malkomplika kaj sincera, kaj labori elkore, ĉar la publikon oni devas neniam trompi.

Kion vi konsideras kiel vian ĉefan kontribuon al la Esperantaj teatro kaj kulturo ĝenerale?

Tion ke mi iel helpis diskonigi la esencan apartenon de nia Ameriko al la monda kulturo. Mi pensas ke aŭtoroj kiel la Nobel-premiito Gabriel García Márquez, la urugvajano Mario Benedetti, la venezuelano Aquiles Nazoa, la brazilano Tiago de Melo, la nikaragvano Ernesto Cardenal, kaj la kubanoj Mirta Aguirre, Celia Torriente, Maria Elena Llana kaj, kompreneble, nia nacia heroo José Martí, indas je rekono kaj diskonigo. Sed mi ŝatas universalecon kaj inkluzivigas en mia repertuaro aŭtorojn el aliaj kontinentoj. Nuntempe mi trastudas la klasikajn aŭtorojn Esperantajn, kaj mi ĝojas ke mi jam havas poemojn de Zamenhof kaj Marjorie Boulton en la repertuaro.

Vi ja estas aktorino prestiĝa nialande. Kio do allogis vin al la E-movado kaj tenas vin en ĝi?

Amiko mia, esperantisto kaj tiama estrarano de la asocio en la provinco Havano, Felix Chao, parolis al mi pri la kvalitoj de Esperanto kaj konvinkis min lerni ĝin. Tio okazis en 1988. Mi restas plu en la movado, ĉar en ĝi mi eltrovis grandan familion kaj konatiĝis kun vasta, frateca kaj mirinda mondo.

Kio motivis vin munti repertuaron altnivelan en Esperanto?

Bonŝance mi eltrovis, sufiĉe frue, tradukantojn kiuj bone elhispanigis mian repertuaron: Gustavo Morales kaj poste vin mem, kara Maritza. Miaflanke ĉiam regas postulemo rilate la kvaliton de la repertuaro, kaj do, ankaŭ de la traduko.

Kiel vi ricevis vian Esperantan fajrobapton?

Tio okazis en novembro 1988, en la Havano sidejo de la kubaj artistoj kaj verkistoj. Tiam mi estis novbakita esperantistino nur trimonata. Mi deklamis tre konatan poemon de Mario Benedetti, "Latinamerika Patronia". Oni ĝin akceptis tre bone, sed mi nomus mian prezentiĝon aŭdaco. La vere altnivela fajrobapto estis la Havano UK en 1990, ĉar nur ĝi povis certigi ĉu vere mi sukcesas komuniki al tre heterogena publiko mian arton en Esperanto, ĉu ili akceptas min. Aplaudito forta kaj longdaŭra rekonis mian laboron kiel parton de la kuba kulturo prezentita en la kongreso, kaj la postaj kritikoj tre favoraj en *Esperanto*, *Heroldo* kaj aliaj gazetoj profunde emociis min.

Vi turneis tra kelkaj eŭropaj landoj, kun kulmino en la Valencio UK. Kiu momento estis la plej grava por via kariero?

Nu, tamen mi ĉiam konsideras kiel la plej gravan kaj decidan momenton la prezenton en la Havano UK, tial ke per ĝi mi eniris la E-movadon, kaj ekde tiam UEA konstante invitas min partopreni la kulturen programon de UK-oj. Kiel artisto, mi profunde dankas pro tiuj invitoj, kiuj inkluzivas restadkostojn. Evidentas ke ĉiuj scias pri niaj financaj malfacilaĵoj pro la ekonomia situacio travivata de nia lando pro, interalie, plurjara ekonomia kaj komerca sieĝo. Do ĝuste pro tio mi dankas kaj porĉiame dankos ankaŭ al Flandra E-Ligo, al Belga E-Federacio, al ĉiuj karaj amikoj homamaj kiel Anne Johnson, Georgia Henningssen, gedzoj Alex Humet kaj Ite Tytgat, geedzoj Blanke, kaj aliaj kiuj alte aprezas mian laboron kaj ebligis miajn vojaĝojn al Valencio kaj Prago. ★

Georgina Almanza



Kuba aktorino tre konata pro serioza kaj longdaŭra laboro en teatro, radio, televido kaj kino. Membro-fondinto de la teatra grupo "Maskoj", en kiu ŝi rolis gravajn figurojn de la mondliteraturo, kiel Mary Warren en *Sorĉistinoj de Salem* de A. Miller, Sinjorino Inés en *Don Juan Tenorio* de J. Zorrilla, kaj aliaj. Ŝi laboris en kubaj filmoj kiel *Amatino* de Humberto Solás kaj *Odiseo de l'general* José de Julio Fraga. Ŝi ricevis diversajn naciajn premiojn, i.a. Distingon por la Nacia Kulturo. Ŝiaj aperoj en UK-oj: *Mi rompas mian rutinon*, Havano 1990 kaj Prago 1996; *La eksterordinaraj deklaraĵoj de Rosa Penderton* (José A. Rodríguez), Valencio 1993; *Lordino Makbeto en koncert-kafejo* (Carlos Francos), Prago 1996. Kasedoj: *Poemoj, kanzonoj, monologoj* kaj *Mi rompas mian rutinon* (ambaŭ 1996, 18,00 gld. resp. 19,60 gld. ĉe la Libroservo de UEA).

mg-ie



Ĉu ni konstruos novan ŝtupon?



La artikolo de R. Dobrzyński pri Mazi en Pola Televido (dec., p. 202) finiĝas per du demandoj, ĉiam aktualaj: “Kiel stiri la lernadon por ke la spek-

tantoj efektive ekregu la lingvon? Kiel la movadu ensorbu la homojn kiuj tiel ellernos Esperanton?”

Por provi respondi, necesas unue skize analizi la fenomenon Esperanto.

Lingvoj kaj kulturoj evoluas paralele kun la socia-ekonomia evoluo de la koncernaj homgrupoj, kaj la du evoluoj reciproke sin influas. Pli forta ekonomio instigas pliriĉigon kaj plinormigon de lingvo. Pli normigita kaj pli kulturita lingvo plifortigas la grupkonscion, do la forton de la grupo.

Kvankam ĝi povas ŝajni alispeca, Esperanto tamen ne estas escepto. Transdonante ĝin al la uzontaro, Zamenhof ebligis ke ĝi fariĝu lingva fenomeno normala, ne escepta. Tial tuj de la naskiĝo komenciĝis la procezo de la menciita reciproka influado.

Ĉiu grupo karakteriziĝas per sia grupa spirito (identeco), kiu estiĝas per eduk-procezo kaj per eduk-generita kulturo. Individuoj portas tiun identecon en la formo de kredo pri la celoj kaj roloj de sia grupo en la mondo. Ĉiu lingvo havas du funkciojn: la komunikan kaj la identecan. Ĝi estas la ĉefa kaj plej klara signo pri onia aparteno al iu grupo.

Ekde la ekesto de Esperanto, do, la adeptoj adoptis la grupan kredon (t.e. la internan ideon), kiun iniciatis Zamenhof mem sed efektive difinis la “popolo”: “la sankta rolo de nia grupo estas paciĝi la mondon per la komuna lingvo!” La apartenon al la “popolo” difinas unuavice ne bona rego de Esperanto, sed forta kredo je la interna ideo. Esperantisto estas homo edukita akcepti la kredon de la esperantistoj kaj almenaŭ balbuti la lingvon.

Same kiel ĉiuj aliaj homgrupoj, ni volas konvinki eksterulojn ke nia grupo estas la plej bona, ke ĝi maksimume garantias bonfarton de individuo, kondiĉe ke tiu akceptu maksimuman lojalecon. Kaj ni varbas. Sed jen la kontraŭdiro: se ni montras al amasoj, ekz. per la pola televido, la objektivan komunikan valoron de nia lingvo kaj se multaj ekinteresiĝas pri ĝi, ni ne kapablas:

— plu instruante la lingvon eduki ilin al akcepto de nia ideologio kaj tiel integri ilin en nian popolon; aŭ

— ekinteresi komercistojn al vendado de nia komunika varo sen paroli pri nia “religio”.

Ĉu ni ne kapablas aŭ ne volas? Nek nek! Sed ĉefe ni ne volas. Rapide eduki amasojn al akcepto de nia ideologio ne eblas, do ni ne interesiĝu pri tiuj amasoj. Doni profiton al “sendiaj” komercistoj pro nia lingvo estas eĉ pli granda herezo: necesas absolute ignori ĉiun kiu dezirus tion fari!

Nek la iamaj televidaj kursoj en Ĉeĥoslovakio, Nederlando kaj Ĉinio, nek la nuna pola kurso sukcesos esence pligrandigi la nombron de niaj polanoj. Kial? Ĉar ni, anoj de Esperantujo, akceptas nur tiujn kiuj longtempe partoprenis niajn ceremoniojn kaj tiel pruvis sian ideologian apartenon al nia grupo.

Ĉu ĉio tio estas negativa? Jes, sed ĉefe ne! Stranga respondo, sed jen la argumentoj:

Sen la intuicia kompreno de Zamenhof pri tio ke lernolibra iniciato fariĝas lingvo nur se ĝi funkcias ankaŭ kiel identigilo de iu grupo, Esperanto ne estus povinta fariĝi efektive valora, vivanta lingvo. Por tio necesis propra ideologio, kiu kunkreadis la popolon. Jen kial la ekzisto de bazokrea ideologio estas bona. Sed la ekestinta popolo ne plu interesiĝas pri la baza celo de la internacia lingvo: ke ĝi fariĝu monda lingvo por ĉiu. Efektive la E-movado (E-popolo) batalas kontraŭ tiu celo!

Mi vidas unu eblan eliron el tiu ĉi ŝajna absurdo. Necesas ligi al Esperanto novan ideologion: tiun kiun bezonas la nun formiĝanta eŭrop-unia popolo (ne la sumo de la nunaj popoloj de Eŭropa Unio!). Necesas kunigi la kredon ke nepras ekzisto de eŭrop-unia ŝtato kiel muro kontraŭ nova milita konflikto en Eŭropo (kaj do kontraŭ tutmonda milito eventuale detruonta la tutan homan civilizon) kun la bezono de tiu ŝtato je komuna lingvo kiu portu la identecon, la spiriton de la eŭrop-unianoj.

Tiel Esperanto povus ricevi novan rolon de eŭropa lingvo, kaj Eŭropo per siaj ekonomia potenco kaj prestiĝo poste influus ankaŭ la tutmondigon de Esperanto. La tutmondigo — kiun nun teorie deziras la esperantistoj — ne povas esti tuja celo, ĉar ĝi estas tro megalomania strebo. Unue ni, la polanoj de Esperantujo, devas esti pretaj transdoni nian lingvon al alia popolo (ekz. la eŭrop-unia) havanta alian ideologion — kio signifas ke per tio nia popolo devos malaperi! Se ni povos fari tion, ni konstruos novan ŝtupon en la monda historio; se ni ne povos fari tion, Esperanto restos ankoraŭ kelkan tempon lingvo de sen-signifa popolo, dum la rolon de eŭrop-unia identec-lingvo transprenos iu alia lingvo neŭtrala; alie, Eŭropa Unio post kelkaj jardekoj disfalus per katastrofa milito.

Zlatko Tišljar (Kroatio/Slovenio)

Doktoro Georges SALAN

La Ruda Vero

Originala raporto

pri propraj travivaĵoj en naziaj koncentrejoj
1944 - 1945



Nimes: la aŭtoro, 1975. 188p. 22cm.
15,00 gld. Triona rabato ĉe samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj.

La Akademio ne dormemas

Letero de Katarina Eckstädt pri akademiano dormanta dum publika kunsido (jan., p. 9) provokis multajn reagojn (vd. ankaŭ p. 76). Membro de la Akademio, Aldo de' Giorgi defendas ĝian honoron per klarigo de ĝia funkciado.

Unue, por iom senkulpigi tiun akademianon kiu dormis dum la publika kunsido de la Akademio en Prago, mi atestas ke tiam li diris al mi ke li malbonfartas.

Tamen la letertitolo “Vekiĝu ĉiu akademiano” tiklis min kaj spronis ion plian diri pri la funkcio kaj laboroj de la Akademio.

Nu, kiel evidentiĝis ankaŭ dum la kunsido ĉe la UK, estas klare ke la ĝenerala esperantistaro nemulton — ofte eĉ nenion — scias pri la taskoj kaj aktivecoj de nia supera lingva instanco, kaj multaj eĉ dubas pri ĝia neceso. Tiu sinteno estas komprenebla, kaj pri ĝi kulpas larĝparte la Akademio mem, kiel mi klopodos demonstri ĉi-sekve.

Mi estas membro (kvankam dubmerite) de la Akademio jam de pluraj jaroj. Dume la paperaĵoj pri ties laboroj plenigis ĉe mi tri plurkilogramajn dosierojn. Mi povas certigi ke ne temas nur pri la lavangaj kaj disputigaj teoremoj pri la landnomoj, dum la Albault-a periodo. Nur unu bagatelan ekzemplon: iam ni longe diskutis pri akcepto aŭ ne de la proponita, kaj de multaj verkistoj uzata, nova prepozicio *far* (mi voĉdonis nee).

Sed jen eble klariga atesto. Nur post la lastjara UK en Prago, post apelacio de la nova akademiano prezidanto, Werner Bormann, mi decidis aliĝi kaj kun-

labori en la sekcioj pri “ĝenerala vortaro” (direktoro Bernard Golden), “prononcado” (Gerald Mattos) kaj “literaturo” (Carlo Minnaja). Do, nur en la unue citita sekcio, dum malmultaj monatoj, jam cirkulis inter la sekcianoj pluraj dekoj da cirkuleroj kaj leteroj, nur por diskuti kiujn terminojn elekti (kaj eventuale rekomendi aŭ oficialigi) inter la vortoj *eŭro*, *eŭroo* aŭ *euro*; *grafito* aŭ *grafitio*; *Alsaco*, *Alzaco* aŭ *Elsaco*. De entute ok sekcianoj mi ricevis faskojn da detale kaj fakege ellaboritaj studoj. Egale en la sekcio pri prononcado, kie Mattos submetis al ekzamenado pri tolerindeco plurajn dekojn da kazoj de konstateblaj deflankigoj disde la fundamentaj prononcreguloj (ekzemple, laŭ la nacieco, eblas aŭdi *absolvi*, *apsolvi* aŭ *abzolvi*). Mattos ankaŭ dissendis sonbendojn, por ke ĉiu sekciano surbendigu proponitan tekston, por povi kompari la diversnaciajn prononcvariantojn. Dume en la sekcio pri literaturo Minnaja proponis kolosan projekton, reserĉlaboron, kies priskribo necesigus plurajn paĝojn.

Mi esperas ke ĉi tiuj ekzemploj helpas malkonfirmi la ĝeneralan impreson ke la Akademio nenion faras. Sed, kiel dirite, precipe la Akademio mem kulpas pri la larĝa nescio pri ties aktivecoj. Jam plurfoje mi plendis ĉe la estraro



“Pli bone diri stultaĵojn kiel mi, ol ronki sur fotelo de la Akademio!” — kantis iam Raymond Schwartz. Sed intertempe la Akademio vekigis.

ke ĝi neniom zorgas informi la esperantistaron pri la faritaj laboroj, pri la endiskutaj problemoj. Jam plurfoje mi sugestis ke la estraro kaj la sekciestroj sendu regule koncizajn raportojn al nia gazetaro.

Feliĉe, kaj finfine, la nova estraro ŝajne enpaŝis tiun vojon. Lastatempe pluraj informoj pri la Akademio aperis en kelkaj gazetoj. Pri tio precipe zorgas la speciala komisiito, Amri Wandel, kaj la nova, agema sekretario, Perla Martinelli. Interalie ĉi lasta klopodas enkonduki iom da ordo en la sekretariajn aferojn, ĉar ŝi malkovris ke la Akademio ne posedas proprajn arkivon, protokolon, librotendon, spezkonton, stampilojn, kovertojn, leterpaperon k.s. Oni diras ke “malpurajn tolaĵojn oni lavas en-familie”, tamen estas eble instrue malkaŝi ke, ĝis nun, la Akademio aktivis plejparte individue (t.e. ke laboregis, ĉion prizorgis la prezidanto kaj la sekretario), sed iom diletantece, laŭ organiza vidpunkto improvize. Pro tio estas antaŭvidite revizii la Akademian statuton kaj enkonduki modifojn en ĝin, ekzemple rilate la mankantan oficon de revizoroj. Komisiito por tiu tasko estas François Lo Jacomo.

Alia faceto de la laboroj de la Akademio estas laŭ mi eksplikinda. Ĝi konsistas el 45-o da homoj, loĝantaj

Esperanta Kultura Festivalo

Aalen (Germanio), 10-14 majo 1997

- Kabaredaĵo de fraŭlino Barlaston
- “Poezio internacia” de Spomenka Štimec kaj Adolf Burkhardt
- Muziko de Jacques Yvart, Katrien Duvalier, Kajto
- D-ro Werner Bormann pri la eŭropa mono
- Manfred kaj Ikuko Sona pri bankulturo japana kaj internacia
- Seminario de Elisabeth Schwarzer pri rasismo kaj antaŭjuĝoj
- Stefan Fisahn prezentas sian kompakt-diskon *EspeRom*

- Multaj aranĝoj por kaj kun la ekstera publiko de la urbo Aalen

Tuj post la festivalo:

Eŭropa Junulara Parlamento

13-16 majo, Stuttgart

Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso

16-19 majo, Stuttgart

Aliĝu aŭ informiĝu ĉe:

Esperanto Stuttgart, Dachtlerstr. 21,
DE-70499 Stuttgart, Germanio;

☎ +49/711/138-89-80; ☎ 138-89-82.

dise en la mondo. Tial la kontaktoj, la diskutoj, la decidoj efektiviĝas praktike nur koresponde. Kaj ne ĉiuj homoj estas same diligentaj, tujrespondaj. Ne ĉie kaj ĉiam la poŝtoservoj fulme funkcias. Pro tio ĉiu problemoj, ĉiu elekto, ĉiu decido postulas regule longan, longan tempon. Eble indas ankaŭ atentigi ke en la Akademio sidas homoj kun tre malsimilaj ideoj, konceptoj kaj tendencoj konsidere nian lingvon. Malsamas la Esperanto(j) kutime uzata(j) de, unuflanke, Neves, Camacho, Haupenthal, Albault k.a., kaj aliflanke Bormann, Boulton, Minnaja, Tonkin k.a. Pro tio estas ofte malfacile akordigi la malsamajn vidpunktojn kaj alveni al komunaj elektoj kaj decidoj.

Ĉi tie mi ne alfrontas la antikvan diskuton ĉu la Akademio devas nur sekvi kaj ekzameni la naturan evoluon de la lingvo kaj sankcii per oficialigo tion kio estas jam larĝe akceptita, aŭ,

male, gvidi, konsili kaj aprobi aprobindaĵojn kaj malrekomendi deflankiĝojn, evitindaĵojn. (Persone mi emas pendu laŭ la dua flanko.)

Rapidaj respondoj

Nuntempe estas krome en diskuto starigo de ia kelkhoma kaj aŭtoritata "Konsilgrupo", kiu respondu al prilingvaj demandoj de unuopaj esperantistoj, sen atendo de ĝenerala interkonsento. Dum kelka tempo tiun rolon plenumis la bedaŭrinde formortinta periodaĵo *La Letero de la Akademio*. Iu sugestis ke, kiam temas pri negravaj demandoj, la sekciestroj rajtu mem decidi, respondi, interkonsente nur kun la sekcianoj. Cetere io tia okazas ĉe la registaroj de multaj landoj, kie la leĝfara povo apartenas al la parlamento, sed kie, en kazoj de urĝo aŭ neceso (en mia lando preskaŭ ĉiam) la leĝojn faras la ekzekutivo (la ministraro), kaj la parlamento

nur poste diskutas kaj promulgas tiujn leĝojn.

Alispeca kritiko leviĝis lastatempe. Iuj atentigis ke estas eble iom klane, framasone, ke la akademianoj mem elektas siajn kolegojn. Iuj opinias ke tia proceduro ne estas tute taŭga, ke tiamaniere povas akademianiĝi ankaŭ homoj ne tiom meritaj, kaj iuj akuzas ke pro tio pluraj tre valoraj homoj forlasis la Akademion, dum aliaj ĉiam rifuzis kandidatiĝi.

Jen, mi esperas esti evidentiginta kelkajn apartajn aspektojn de la funkciado de la Akademio, tamen substrekante ke mi esprimis nur tute personajn impresojn kaj juĝojn. Kaj tion mi elpafis (laŭ mia karaktero) intence iom provoke, ĝuste kun la celo instigi reagojn. Ĉar mi certas ke, eĉ se kun iuj mankoj, nia Akademio estas nepre laborema, sendube necesa kaj utila, ke ĝi ĉiukaze meritas diskonigon.

Aldo de' Giorgi (Italio)

Euro, graffiti, Alsace/Elsass: Provizoraj rezultoj

Direktoro de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro, la aŭtoro dissendis al la sekcianoj enketon pri la plej ĝusta maniero esperantigi (1) la nomon de la monunuo euro, (2) la italdevenan vorton graffiti, kaj (3) la toponimon Alsace/Elsass (franca/germana).

Jam en oktobro 1996 ĉiuj membroj de la sekcio sendis al mi siajn respondojn. Mi tiel havis eblon analizi la proponojn, kiuj plejparte estis pravigitaj per etimologiaj informoj, historiaj kaj politikaj donitaĵoj, kaj ankaŭ fontcitaĵoj de lingvouzo en Esperanto. Surbaze de tiu materialo mi preparis 11-paĝan resuman raporton, kiu estis fotokopiita kaj sendita al la membroj de la sekcio. Post kiam ili havos tempon trastudi la opiniojn de siaj kolegoj, komenciĝos la dua fazo de la esploro kun kolektado de komentoj, kritikoj, kaj ankaŭ novaj donitaĵoj. Tiam fariĝos eble redakti raporton kun konkludoj, kiu estos prezentita al la tuta Akademio por plua pritraktado.

Nun mi prezentos por la publiko en Esperantujo informon pri la rezultoj de la ĝisnuna enketado. La formo *eŭro* ricevis preskaŭ unu-

animan apogon (ok preferoj kontraŭ unu nula propono). Al *graffiti* mankas samgrada akcepto de nur unu maniero asimili ĝin. Kvar sekcianoj preferis *grafitioj*, du elektis *grafito* (malgraŭ tio ke ĝi jam havas la signifon de mineralo), kaj la ceteraj tri proponoj estis *murumo*, *murskribaĵo* kaj *gravurado* (kvankam tiuj ĉi vortoj esprimas nur parton de la tuta signifo de *graffiti*). Pli malkontentiga estas la provo solvi la asimilad-problemon rilate la toponimon *Alsace/Elsass*. *Alsaco*, *Alzaco*, *Alsatio* (neŭtrala formo bazita sur la latina nomo) kaj *Alsaso* ricevis po du apogojn, kaj *Elzaco* nur unu. Du sekcianoj indikis ke por ili *Alsaco* kaj *Alzaco* estas akcepteblaj kiel duaj preferoj. Estos interese ekscii en la dua stadio de la enketo kiel la preferoj ŝanĝiĝos. Ne estas dubo ke la pozicio de *eŭro* estas neŝancelebla, kaj mi havas la im-

preson ke post pripensado plifortigos la apogado de *graffitio*. Nur *Alsace/Elsass* postulos pli profundan diskutadon.

Bernard Golden (Hungario)


Pli ol 6000 subskriboj

La subskriboj por la Manifesto de Prago nombris la 19-an de marto 6322. La kolektado plu daŭras. Kartojn por 4 nomoj kaj foliojn por 20 nomoj oni povas senpage ricevi de la CO. Krome oni rajtas kopii ilin kaj represi ekz. en landaj kaj lokaj gazetoj kaj bultenoj.

La Informa Fakto de UEA disponigas diverslingvajn tradukojn laŭ peto. Elektronikaj variantoj en pluraj lingvoj estas legeblaj en la TTT-paĝo de Sveda E-Federacio: <http://www.esperanto.se/>.

Projekto pri la agadplano por la Kampanjo 2000 de UEA (vd. p. 62) antaŭvidas novan nomformon por la dokumento, kies plena titolo estas "Manifesto de Prago de la movado por la internacia lingvo Esperanto". La agadplano konsilas ekde nun nomi ĝin "Manifesto de la Esperanto-movado".

Recenzoj



Kultura trezoro plej aŭtente perita

Ruĝdoma sonĝo. Volumo 1. CAO Xueqin (1724-1764). El la ĉina trad. Xie Yuming. Beijing: Ĉina Esperanta Eldonejo, 1995. 16+582p. 21cm. Bind. Kromkovrilo. 42,00 gld.

Unuafoje enkondukante en la revuo *Penseo* (n-ro 42, dec. 1993) la Esperantan tradukon de *Ruĝdoma sonĝo* (RS), SHI Chengtai cite rimarkigis: "Por paroli pri Homero necesus esti alia Homero." Se temas pri aŭtoro kaj originalo kiel la jenaj, mi prefere silentu...

Neatendite, la rimarkigo antaŭtrafis la fenomenon ke unu jaron post la apero de Volumo 1 troviĝas nenio sensacia eĉ en Esperantujo. Probable tute ne malmultas legantoj de la traduko, sed ankaŭ ili prefere silentas leginte ĝin.

Tamen mi supozas ke niaj samideanoj ne tiom komprenas pri Cao kaj lia romano kiom pri Homero kaj ties epopeo. Antaŭ pluraj jaroj mi vidis en ĵurnalo liston de mondfamaj verkoj rekomenditaj en Usono al studentoj. En la listo estis neniŭ libro el Ĉinio! Kies domaĝo? Evidente ne de la ĉinoj! Mi esperas ke ni esperantistoj ne perdus la bonŝancon ĝui la ĉinan kulturen trezoron pro ia antaŭjuĝo.

Pri la originalo tie ĉi mi ne povas ne citi recenzon patosan de WANG Meng, ĉina ekskulturministro, nuntempa verkisto elstara:

RS estas deponaĵo de spertoj. Spertoj vivaj, sociaj, sentaj, politikaj, artaj — nenio ne enhaviĝas. RS ja estas la vivo. Legu de RS estas reviviga, almenaŭ pluviviga je 20 jaroj. [...]



La ilustraĵoj de *Ruĝdoma sonĝo* venas el plat-presita versio de 1890.

RS estas libro animsava. Ĉio spertiĝis; troviĝas nur egaj kompatato, apatio, ĝojo kaj vako. Nur nenieco. Ĉiuj estoj estas vanto kaj eĉ trompo. Nur nenieco restas realo. [...]

RS estas libro kultura. En ĝi preskaŭ jam eluziĝis la eblaro de la literaturo ĉinlingva; finverkiĝis nia kulturo. RS estas enciklopedio, ne nur de la feŭdisma socio.

La stilo de la traduko memorigas pri James Joyce kaj ties *Uliŝo*. Temas nur pri la strukturo de frazoj, kompreneble. Nome, enas koncize ŝparaj frazoj anstataŭ kompletaj frazoj kutimaj, kiel jene: "Ĉu ne faro merita?" (p. 7) aŭ "Boate norden!" (p. 14). Tiaj trafaj esprimoj troveblas preskaŭ en ĉiu paĝo! Ĝuu!!

Akademiano, s-ro Xie tradukis la romanon kiel eble plej aŭtente. De la signifplenaj personaj nomoj al la delikataj ĉinlingvaj rimoj kaj ĝis la metafizikaj etosoj... Tion bedaŭrinde nur ĉinoj aŭ sciintoj de la ĉina lingvo kapablas vere percepti, legante samtempe la originalon. Tamen interesataj eksterlandanoj povas konstati la superecon de la Esperanta esprimivo sub la mano de Xie, komparante versiojn ekz. en la franca aŭ la angla (tr. YANG Xianyi kaj Gladys Yang, Beijing: Fremdlingva Eldonejo, 1994). Krome en la traduko de Xie ekzistas abundaj notoj. Pro ili legantoj povas rikolte kompreni la apartan ĉinan kulturon.

Kun atento ni atendas baldaŭan aperon de la postaj du volumoj. [Red.: Pri Volumo 2 vd. "Lasta aperis", p. 75.]

MAO Zifu (Ĉinio)

Kompleksa etna problemaro

Madjaroj (hungaroj) en Vojvodino. Red. KABÓK István. El la hungara trad. S. Fenyvessy, C. Csőke, L. Huszár. Budapeŝto: Sorobano, 1994. 103p. 21cm. 15,90 gld.

La disfalo de la eksa Jugoslavio surprizis — eĉ konsternis — multajn homojn, samkiel la milito akompananta kaj sekvinta tiun disfalon. Tiel komenciĝas ĉi tiu libro, kiu sukcese informas pri la komplekseco de la etna problemaro en tiu mondoparto.

La verko prezentas la historian fonon kaj nunan situacion de la hungaroj vivantaj en la regiono Vojvodino, iliajn strebojn al aŭtonomeco kiel rimedo por pluekzistado

kaj ekzemplojn de ilia literaturo. Kiel multaj "modernaj" liberaluloj, la redaktinto metas grandajn kulpojn pri la nunaj problemoj sur la antaŭan komunisman reĝimon. Mi volas substreki nur ke tiu almenaŭ provis bremsi la etnajn malamojn tie kie ĝi (malbone) regis. Mi mem detenas min de tro hastaj konkludoj, sed estas evidente ke ĝuste la fino de la "grandaj" hom-savaj ideologioj markis la renaskiĝon de la malgrandaj naciismoj.

En mia multjara sperto pri ĉi tiaj problemoj mi trovis ke etna kunvivado iugrade sukcesas nur en kelkaj skandinaviaj landoj kaj en Svislando, ĉar tie la plimulto estas preta helpi la malplimultojn pretervivi. Estas dubinde ke serboj pretas je tio. La sorto de hungaroj en Vojvodino estas nun tre zorgodona. Mi ne havas efikajn rekomendojn por helpi ilin. Eble ni ĉiuj en aliaj landoj devus provi konvinki niajn registarojn fari ion por, kaj ne nur paroli pri, homaj kaj etnaj rajtoj. Bedaŭrinde la konduito de la liberaj kaj "malkomunismaj" registaroj fronte al la milito en eksa Jugoslavujo ne malpli konsternis nin ol la milito mem.

Renato Corsetti (Italio)

Ĉu ek(s) al plena verkaro?

La armeoj de Paluzie. Manuel de Seabra (1932). Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 1996. 198p. 23cm. 27,00 gld.

Manuel de Seabra estas profesia romanisto en la kataluna kaj la portugala, kiu lastatempe aktivas ankaŭ en la Esperanta beletro pere de la Viena eldonejo IEM (daŭriganto de "Pro Esperanto"). Ni vidu do kion de Seabra proponas per sia ensalto en la internacian arenon.

Por la unua fojo, mi ne ellegis recen-zotan libron, ĉar mi simple ne eltenis. La aŭtoro rakontas en fina "Kolofono" ke dum verkado lia kreivo blokiĝis sur paĝo 50 — nu, mi atingis nur la 26-an . . . kaj pli ol sufiĉis. Povus esti ke mi nenion komprenis, ĉar divers-buŝe mi aŭdis laŭdojn al *La armeoj de Paluzie*, kiujn mi vere penis memori dum legado — sed ĉio vanis.

Sur la sesa paĝo la aŭtoro dankas konatajn esperantistojn pro la prov-lego, sed oni ricevas la impreson ke preskoboldo ŝanĝis disketon kaj publikigis la nekorektitan manuskripton. Kvankam teorie ĉi tiu romano verkiĝis originale en la internacia lingvo kaj nur poste tradukiĝis al la kataluna, portugala kaj rusa, oni ne povas ne vidi la latinidan sintakson malantaŭ ĉiu frazo, ofte rande de sklaveco. La

fraz-strukturo ne respondas al tiu nia lingva, sed konstante aspektas fuŝ-traduke. La stilo balaste trenas latinidismojn — eĉ pri interpunkcio. Kro-



La plumbarmeo de Paluzie (kovrila bildo)

me, en preskaŭ ĉiu alineo troviĝas lingvaj eraroj, ne nur tipe latinidaj, sed ankaŭ pure Esperantaj. Mi abomenas citadi erarojn en simpla recenzo, sed mi ja devas pravigi mian eldiron. Juĝu mem ĉu plialtigas la beletran nivelon de *La armeoj de Paluzie* la latinidismoj *orgojligis* anst. *fierigis* (7), *ekzakte* anst. *ĝuste* aŭ *precize* (7), *feroca* anst. *avida* aŭ *vora* (9, 23), *priokupiĝi* anst. *zorgi* (9), *rememori* anst. *memori* (10), *kilo* anst. *kilogramo* (18), *post trairi* anst. *trairinte* (23), *oferi* anst. *proponi*

au *oferti* (23), *inciti* anst. *emigi* aŭ *instigi* (23), *flosi* anst. *ŝvebi* (24), *sen-saco* anst. *impreso* (24), *imago* anst. *bildo* (25), *paroli etende* anst. *paroli longe* (26), kaj la pure Esperantaj eraroj *ekde* kun spaca signifo (8), *putriĝo* anst. *putr(ad)o* (8, 22), *tegigi* anst. *tegi* (21), kaj *establita* anst. *lokita* (24). Aparte agacas kaj lacigas la konstanta apero de la idiotismo *pli poste*.

La enhavo — kvazaŭ sagaa famili-historio — ne tro interesas: jen denove grizo kaj malritmo. Verkisto neniam forgesu: romano kiu ne kapablas vekti intereson jam de la komenco, estas malbona romano. Kaj ĉu iom postulema leganto povus ignori lingvajn malglatejaĵojn kiuj malhelpas fluan, interes-kaptan plulegon? Mi samtempe ĝuis libron de Trevor Steele — aŭtoro ĉiam riĉiga —, kaj la subkvalito ĉe de Seabra fariĝis eĉ pli evidenta.

La armeoj de Paluzie estas verko kiun mi neniel rekomendus al komencanto: la eldonado de tiaspecaj libroj en nia lingvo pruvas nur respekto-mankon al la publiko. Kaj bedaŭrinde estas centoj, eble miloj, da tiaj pezaj, nedigesteblaj mislingvaĵoj en nia merkato: ĉu ne jam estas tempo halti? Eks al ili!

Nur unu fina penso: Ŝajne IEM planas publikigi la plenan verkaron de de Seabra. Ĉu inde?

Antonio Valén (Hispanio)

Nature, kulture, amore

Neniu povas ŝanĝi hieraŭon. Aira Kankkunen (1928). Göteborg: la aŭtoro, 1996. 63p. 21cm. 7,50 gld. **Pluralogo.** Vimala Devi. Thaumiers: La KancerKliniko, 1996. 79p. 21cm. 16,50 gld. **Vino, viroj kaj kanto.** Eli Urbanová (1922). Chapecó: Fonto, 1995. 60p. 21cm. Ilustris Richard Fremund. Fonto-Kajeroj 16. 10,80 gld.

Tri poemaroj traktendaj unurecenze — ĉu estas necese artifiki por submeti ilin al sama temo? Kaj se temas pri tri poetoj virinaj? Ĉu la sekso povas difini aŭtorojn, ĉu ĝi vere kapablas krei komunajn trajtojn? Ni foliumu.

Aira Kankkunen, Suomi-devena, observas de sur sia balkono en la sveda Göteborg la naturon ĉirkaŭ si. Arbo, burĝono, branĉo, birdo, nesto k.s. estas vortoj preferataj; la subtitolo "Meze de pomarboj kaj leontodoj" plej bone spegulas la temaron. Sed la tekstoj ne estas simplaj naturpoemoj. La aŭtorino sukcesas enigi en la liberformajn, senrimajn poeziaĵojn sian propran personecon, tamen elformante ĝenerale validajn etosojn, kiujn ne nur naturŝatantoj aprezos.

Vimala Devi, el Portugalio, verkinta ankaŭ en la kataluna kaj la hispana, estas krome pentristino kaj tradukis pli ol 50 librojn. En tiu ĉi sia unua Esperanta libro ŝi ie skribis "... kaj ni palpas la defion de novaj konceptoj". Ŝiaj novaj konceptoj baziĝas sur la tuta fono de la eŭropa kulturo, aludas poetojn kaj pentristojn, historion kaj filozofion. La tekstoj ne havas rimojn kaj ne sekvas firmajn formojn, estas ofte tre densigitaj, neniu vorto troa, originala la stilo, personecaj trajtoj — la poetino facile troviĝus inter renomaj nacilingvaj kolegoj.

Eli Urbanová, ĉeĥino, laste furoris pro aŭtobiografia romano. Ankaŭ ŝia poemaro rakontas el ŝia vivo, precipe pri ties partoj amaj kaj amoraj. La

tekstoj plej ofte aspektas rimitaj kaj firmaritmaj, sed multaj devioj demandigas ĉu intencaj aŭ hazardaj estas tiom da licencoj. La lasta poemo reklame promesas "... multe pli pezajn kalibrojn" en la supre mencita romano. Nu, kiu ŝatas memnudigajn tekstojn poeziforme, trovos certe en tiu ĉi poemaro ion konvenan. La libreton akompanas belaj plumkrajonaj vinjetoj, kelkaj eĉ plurfoje utiligitaj.

Oni ne bezonas longe cerbumi por konstati ke komunaj trajtoj forme kaj enhave tute malestas. Estus ja ridiga opinio ke virinoj estas submetitaj al samaj konceptoj kaj sentoj. Ĉiu el la tri libroj estas bele presita, eksteraj/kovrile inda, parte kun antaŭparolo, biografio, glosaro, preskaŭ sen lingvaj kaj kompostaj eraroj. Jen ja hazarda triopo, tamen pruvanta ke ankaŭ nuntempe en Esperantujo serioza poezio ne estas la laborkampo sole de viroj.

Franz-Georg Rössler (Germanio)



• Montagut: *Utnoa* katalune

La libro *Poemo de Utnoa* de Abel Montagut, sensacio de la Esperanta beletro en 1993, aperis fine de 1996, en scienc-fikcia serio de la eldonejo Pagès, en katalunigo de la aŭtoro mem. Kvankam vers-forma en la Esperanta originalo, la kataluna *La gesta d'Utnoa* prezentigas — por ne “ŝoki prozemulon” (Montagut) — en ŝajn-proza formo, tamen en heksametroj. Mencioj de Esperanto en la dorspaĝa prezentoteksto kaj sur la kopirajtpaĝo espereble ne aspektos al la legantoj mistifiko simila al la asertata aŭtoreco de eksterterano Daa-35 ...



• Goralski: 60 kasedoj

Honora Membro Adamo Goralski, mecenato kaj fondinto de Fondaĵo Grabowski, redaktis kaj dissendis kun sia edzino Kristina jam 60 numerojn de *Internacie Neŭtrala Bulteno Esperantista*, “sonrevuo el Kanarioj”, sonkaseda gazeto senpage dissendata precipe al blinduloj. La 60-a numero de la vari-enhava *INBE* estas tamen la lasta, laŭ anonco de Goralski.

• Vogelmann: Filozofo kun metafizikisto

En januaro (p. 13) ni raportis pri diverslingvaj tradukoj de *La nova realismo* de Bruno Vogelmann. Sur ĉi tiu foto oni vidas Vogelmann (meze) akompanate de Marc Cram (maldekstre), metafizikisto kies “Tutmonda Ĉarto de la 21-a jarcento” estas petebla ĉe: 105 rue Duchamp de l'Église, BE-1020 Laeken, Belgio.

• Laste statistikis

En la revuo *La Ondo de Esperanto* Aleksander Korĵenkov aperigis statistikon pri la enhavo de nia rubriko “Laste aperis”, kiu listigas eldonaĵojn ekvendatajn ĉe la Libroservo de UEA, plejparte aperintajn freŝdate (vd. sube).

Ni elstarigu du el la diversaj konsideroj de Korĵenkov:

Rilate tradukojn, el la 961 titoloj ekvenditaj en 1992-96, tradukitaj estis 210 (21,8%): 34 el la angla, 33 el la franca, 24 el la germana, 17 el la ĉina, kaj la ceteraj — malpli ol duono — el pliaj 34 lingvoj.

La eldonejoj plej aktivaj en 1992-96 estis, laŭvice, Pro Esperanto (Aŭstrio, 32 titoloj), Ĉina E-Eldonejo (25), Flandra E-Ligo (Belgio, 23), Fonto (Brazilo, 23), UEA (Nederlando, 23), Edistudio (Italio, 21), Sezonoj (Ruslando, 20), Kava-Pech (Ĉeĥio, 18), Iltis (Germanio, 17) kaj Ludovikito (Japanio, 16). Entute, en la lasta jarkvino nur 19 eldonejoj publikigis po dek librojn aŭ pli, kvankam ne malpli ol 320 eldonejoj, societoj, entuziasmuloj ktp eldonis librojn en aŭ pri E-o.

Novaj eldonaĵoj ĉe la UEA-Libroservo	1992	1993	1994	1995	1996
Nombro de titoloj	205	136	188	200	232
Suma paĝonombro	25 789	18 511	22 078	23 345	28 637
Nombro de eldonejoj/eldonintoj	103	98	132	113	146
Averaĝa paĝonombro	126	136	117	116	123
Averaĝa prezo (gld.)	15,90	20,10	16,90	16,90	19,30



Bruno Vogelmann (meze)

• Kelklinie

La 1-an de marto kvin-jariĝis la internacia E-gazeto *Eventoj*. Gratulon! ... *La Kontakto*, dumonata organo de la 64-membra Nederlanda Societo de Blindaj kaj malfortevigantaj e-istoj, eniris, sub la redaktado de Jaap Wieringa, sian 50-an jarkolekton. ... Ekde marto legeblas en Interreto la revuoj *Gazeto Andaluzia* (<http://www.redestb.es/personal/delpozo>), *Esperanto sub la Suda Kruco* (<http://www.geocities.com/Athens/Acropolis/5541/esk.htm>) kaj *Ĉizilo*, Esperanta ret-revuo de la Universitato de Kostariko (<http://cariari.ucr.ac.cr/~filo/kovrilo.htm>). ... *Vivu la kanto!*: ĉi-titola kolekto de 45 infankantoj kun didaktikaj sugestoj estas mendebla ĉe la kompilinto, Ton Verwoerd (Luxemburglaan 545, NL-1966 MJ Heemskerk, Nederlando).


• MZ volas pli da scienco en Esperanto

La eldonejo MZ-Verlag (Harald Schicke, Im Heidewinkel 45, DE-21271 Asendorf, Germanio; ☐Harald.Schicke@t-online.de) daŭre pretas eldoni E-lingvajn sciencajn kaj sciencopopularigajn librojn kaj serĉas taŭgajn manuskriptojn. La TTT-paĝo de la eldonejo prezentas i.a. ties fakajn librojn (*La korpo de la homo*, *Lernolibro pri oftalmologio*, *Klodu komprene min ktp*): <http://www.freieheilpraktiker.com/esperant.htm>. (*Eventoj*)

• Heroldo en zorgaj manoj

Post la morto de ties longtempa redaktoro, Ada Fighiera-Sikorska, la eldonado de *Heroldo de Esperanto* transiris — konforme al ŝia deziro — al Kooperativo de Literatura Foiro. Ekde la n-ro 1997/1 ĝin redaktas Perla Martinelli, asistate de Marco Picasso. La numeroj aperintaj en 1997 ne nur tenis sed eĉ altigis la tradician nivelon de *Heroldo*, dank' al larĝ-spektra enhavo (i.a. intervjuo kun Michel Duc Goninaz pri la reviziata PIV, kiu eble estos prespreta fine de 1997) kaj tre zorga grafika laboro. Redakteja adreso: C.P. 237, CH-6830 Chiasso 1, Svislando.

Laste aperis



Aŭtunaj folioj el Międzygórze, La. Versaĵoj. Leszek Łęgowski (1933). El la pola trad. Urszula Tupajka. Bydgoszcz: la aŭtoro, 1994. 38p. 21cm. Ilus. Poemaro dediĉita al ĉiuj vizitintoj de la E-aranĝo "Ora Pola Aŭtuno" en Międzygórze. 7,50 gld.

Babela turo kaj Zamenhof, La. Jeremi Gishron (1948). Jerusalemo: Centro Sivron, 1994. 12p. 21cm. Eseo represita el *Literatura Foiro*. 4,50 gld.

Cent jaroj da soleco (1967). Gabriel García Márquez (1928). El la hispana trad. Fernando de Diego. Chapeco: Fonto, 1992. 372p. 21cm. Serio Orient-Okcidento, n-ro 27. Broŝurita eldono de la pinta verko de la Nobel-premiita kolombiano: historio de la familio Buendía kaj de la vilaĝo Macondo. 48,00 gld.

Deutscher Esperanto-Bund e.V. — Ein Rückblick auf 25 Jahre (1931). Arnold Behrendt (1877-1935). Bibliografia aldono de Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Itlis-Verlag, 1996. 16+2p. ISBN 3 927613 32 0. 21cm. Germanlingva. Rerigardo al la unuaj 25 jaroj (1906-31) de la historio de Germana E-Asocio, fare de siatempa prezidanto. 7,50 gld.

222 simplaj versaĵoj por komencantoj. Laŭlum (Li Shijun, 1923). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1995. 127p. ISBN 7 5052 0242 1. 18cm. Lernofaciligaj, spritaj poemetoj de akademiano. 13,50 gld.

Eminentus bastono, La. Jeremi Gishron (1948). Jerusalemo: Centro Sivron, 1996. 12p. 21cm. Eseo pri eblaj ligoj inter la tekstoj de la Fundamento de Esperanto kaj de la Biblio. 4,50 gld.

Enkonduka lernolibro de interlingvistiko. Vera Barandovská-Frank (1952). Sibiu: Editura Universității din Sibiu, 1995. 105p. 22cm. Kompendio kiu traktas la scienco-branĉon en plej larĝa perspektivo. 7,50 gld.

Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj/Einführung in die Theorie sprachlicher Spiele. Ĉu mi lernu Esperanton?/ Soll ich Esperanto lernen? (1982). Reinhard Selten (1930)/Jonathan Pool (1942). En la germana trad. Joanna Lewoc, Horst S. Holdgrün. Berlin/Paderborn: Akademie Libro servo, 1995. 148p. ISBN 3 929853 03 5. 21cm. Dulingva. Kun resumoj Esperanta, germana, angla, franca, itala, pola. Ludo-teoria pritrakto de la ŝanco de Esperanto fariĝi vaste akceptata mondskala interkomprenilo. 54,00 gld.

Espéranto, L' (1973). Pierre Janton (1933). Paris: Presses Universitaires de France, 1994 (4-a, korektita, eld.). 128p. ISBN 2 13 042569 0. 18cm. Franclingva. Analizo de la lingvo Esperanto, kun resuma historio de ĝiaj literaturo kaj movado. 18,60 gld.

Finnaj fragmentoj. Memore al mia avino. Raimo Pystynen (1930). Hyvinkää

(neindikita): Oy Mendoservo Ak, 1995. 75+32p. ISBN 952 9602 04 9. 24cm. Kun fotoj. Milittempaj kaj postaj rememoroj de karelia esperantisto. 19,80 gld.

Fundamento de Esperanto. Eldono franca (1887). L.L. Zamenhof (1859-1917). Wilrijk: Kariljono, 1997. 11+90p. 21cm. La Gramatiko en la franca, Ekzercaro kaj Universala Vortaro. 21,00 gld.

Homaranismo. Eine Kultur kosmopolitischer Humanität als Brücke zwischen Nationen, Religionen und Weltanschauungen. Helmut Welger (1946). Marburg: Info-Servo, 1996 (3-a, reviziita, eld.). 6+85p. 30cm. Ringe bind. Germanlingva. Komentoj al la Fundamento de Homaranismo, formulita en 1985 laŭ Zamenhofaj ideoj. 16,50 gld.

Idoligo de la senescepteco, La. Kritikaj rimarkoj pri la doktrino de la "Analiza Skolo". Helmut Velger (1946). La aŭtoro, 1995. 6p. 30cm. 1,80 gld.

Instruoprogramo de Esperanto por lernejoj (kune kun metodikaj konsiloj). Andrzej Pettyn (1938). Peano, 1997. 26p. 21cm. Oficialigita en 1967 en Pollando, utila por similaj klopodoj alilande. 6,00 gld.

Johana "d'Arko", pucelino de Francio. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1996. 55p. ISBN 2 906134 36 8. 21cm. Provo dispeli mistifikojn ĉirkaŭ kultata figuro el la historio de Francio. 15,00 gld.

Kontribuoj al la norma esperantologio. Enkonduko, ekspertizetoj, kritikoj. Helmut Velger (1946). Marburg: Info-Servo, 1994. 6+46p. 30cm. Ringe bind. Enkonduko

al nova branĉo de la interlingvistiko, kiu sisteme aplikadas la metodaron de jurscienco. 9,90 gld.

Kosmopolitischer Humanismus. Marburg: Info-Servo, 1989. 28+4p. 21cm. Germanlingva. Fundamento kaj Manifesto de homaranismo, komentitaj. 3,00 gld.

Materialoj pri terminologia agado/en/por Esperanto. Wera Blanke/Detlev Blanke. Berlin: la aŭtoroj, 1996. 34p. 21cm. Deko da represitaj artikoloj kaj elekta bibliografio. 6,60 gld.

Não só idealistas mas realizadores. Coletânea de depoimentos de esperantistas. F. J. G. Marinho, G. A. Bays, S. Chaves, W. Francini, G. kaj U. Grattapaglia, L.H. Knoedt, G. kaj S. Ledon, G. Mattos, E. Pauli, D.Pereira de Souza, F. Rodrigues Valle. Rio de Janeiro: Liney, 1995. 133p. 21cm. Portugallingva. Atestoj de konataj brazilaj e-istoj pri sia vivovojo. 12,00 gld.

Nimfo. Oozato Yosizumi (1926). Miyazaki: la aŭtoro, 1997. 64p. 21cm. Mallongaj aŭtobiografiaj rakontoj kaj aliaj prozaĵetoj, aperintaj en diversaj revuoj (1960-1997). 4,80 gld.

Ordo en ĥaoso. La religia kampteorio. Jeremi Gishron (1948). Jerusalemo: Centro Sivron, 1996. 68p. 21cm. Provo ordigi ĉiujn religiojn en unuecan sistemon. 12,00 gld.

Ruĝdoma sonĝo. Volumo II. CAO Xueqin (1724-64). El la ĉina trad. XIE Yuming. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1996. 4+684p. ISBN 7 5052 0303 7. 21cm. Ilus. Bind. Kromkrovilo. Aŭtobiografia verko pri ruiniĝo de nobela familio kaj tragedio de junaj geamantoj. Laŭ komuna agnosko, la plej grava ĉina romano. Vol. 1 aperis en 1995, vol. 3. aperos en 1997. 60,00 gld.

Sur rando vulkana. 56 elektitaj poemoj pri Hungario inter la jaroj 1952 kaj 1956. József Pesti. Red. Attila Salga. El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: Debrecena Bulteno, 1997. 56p. 21cm. Poemoj ekestintaj en la jaroj antaŭ la revolucio de 1956. 9,00 gld.

Blonda leporo kaj Urso brunulo

Jen bela novaĵo en la magra branĉo de nia poezio por infanoj. Kolekto de 57 poemoj de 22 poetoj, ĉio en flua kaj ofte surprize bela traduko.

Al la mondo donace

Antologio de la serba porinfana poezio

Elektis kaj el la serbokroata tradukis Zlatoje Martinov. Beograd: Strategia, 1996, 80+80p. 20cm. Dulingva. Kun notoj pri la aŭtoroj. Prezo: 24,00 gld.

Triona rabato ĉe samtempa mendo de minimume 3 ekz. ĉe la Libro servo de UEA.

Taglibro de Anne Frank (1942-44). Anne Frank (1929-45). El la nederlanda trad. Nora Bartels. Tokio: Libroteko Tokio, 1997. 299p. 21cm. Nova traduko — bazita sur pli ampleksa kaj pli aŭtenta kompilo lastatempa — de la kortuŝaj taglibraj notoj de knabino mortinta en koncentrejo, verkita en la kaŝloko "la Postdomo". 42,00 gld.

Translation course in Esperanto, A. For advanced students (1979). Frank Reginald Banham (1898-1974). Matraville: Libroservo de Aŭstralia E-Asocio, 1996 (2-a eld.). 106 p. ISBN 0 9586651 1 7. 30cm. Instruas la tradukarton per ekzemplaj tekstoj. 24,00 gld.

Translation in Plansprachen. Beiträge gehalten auf der 5. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 24.-26. November 1995 in Berlin. Div. aŭtoroj. Red. Ulrich Becker. Berlin: GIL, 1996. 71p. ISSN 1432-3567. 30cm. Germanlingva. "Tradukado en planlingvoj": 12 referaĵoj. 18,00 gld.

Tria kolekto de krimnoveloj. Ronald Cecil Gates. Matraville: Libroservo de AEA, 1996. 84p. ISBN 0 9586651 0 9. 21cm. La rolintoj de la du antaŭaj novelaroj de Gates renkontas novajn aventurojn. 13,50 gld.

Tutmonda homaranista adresaro. 1997. 4p. 30cm. 284 adresoj. 1,50 gld.

Unuĝeneze. Norman Berdichevsky. Jerusalem: Centro Sivron, 1996. 7p. 21cm. Pri kelkaj nemulte konataj aspektoj de la hebrea lingvo kaj ĝiaj parencoj. 1,80 gld.

Valo de l'nebul. Spiritisma romano por gejunuloj. Roque Jacintho. El la portugala trad. Flávio Fonseca. Rio de Janeiro: Spiritia Eldona Societo F.V. Lorenz, 1996. 93p. 18cm. 7,80 gld.

Venu antaŭ la Madonon. Leszek Łęgowski (1933). El la pola trad. Urszula Tupajka. Bydgoszcz: la aŭtoro, 1995. 18p. 15cm. Ilus. Dek religiaj poemoj. 3,60 gld.

Venu antaŭ la Madonon/Przyjdź i pokłoń się Madonnie. Poeziaĵoj/Wiersze. Leszek Łęgowski (1933). El la pola trad. Urszula Tupajka. Bydgoszcz: la aŭtoro, 1995. 26p. 21cm. Dulingva. Ilus. 4,80 gld.

Vilaĝano de Ĵemajtoj kaj Litovio. Dionizas Poška (1760-1831). El la litova trad. Telesforas Lukoševičius. Panevėžys: E-Klubo "Revo", 1995. 47p. ISBN 9986 496 02 0. 29cm. Kun ĉiupaĝaj gravuraĵoj de V. Jurkūnas. Poemo pri la vivo de kamparanoj en nord-okcidenta Litovio antaŭ 200 jaroj. 7,50 gld.

What means a language and how does it belong? Jeremi Gishron (1948). Jerusalem: Centro Sivron, 1996. 23p. 21cm. Angla-lingva. Reago al artikolo aperinta en la revuo *The Linguist* pri eventuala elekto de komuna lingvo en Eŭropa Unio, kaj la artikolo mem. 4,50 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Reagoj



Unuavice UK-anoj

Kun intereso kaj ioma amuzo mi legis la leteron de s-ino Katarina Eckstädt "Vekiĝu ĉiu akademiano", en *Esperanto* 1088-1/97, p. 9.

Laŭdindas ŝia atento kaj kompreneblas ŝia atendo pri "eble la plej grava institucio de nia movado" (pri ĝi ŝi povas legi pli amplekse en *Heroldo* 3/97). Cetere, en sia sprita interveno s-ino Eckstädt principe pravas, kun unu escepto, tamen tre grava. La publika kunveno de (parteto de) Akademio de Esperanto en Prago ne estis fragmento de la akademio vivo, sed fragmento de UK. Kia estas UK, tia estas la Akademio en UK: kun laceco pro la longa vojaĝo kaj spirito pli libertempa ol scienca.

Ne, la plejparto de la nuntempaj akademianoj (entute 44) havas aliajn engaĝojn ekster la ĉarme turisma etoso de UK: tial povas okazi ke "fakuloj kiuj vere havas konon kaj sufiĉe da intereso pri Esperanto" ne ĉeestas ĝuste la Universalan Kongreson.

Perla Martinelli

Ĝenerala sekretario de AdE

Juĝo hasta kaj senscيا

Letero en la januara *Esperanto* akuzas iun akademianon pri manko de serioza intereso, ĉar li ekdormis dum la publika kunveno. Pli racia klarigo estus ke li estis ege laca aŭ fartis iom malbone.

Mi ne scias pri kiu kolego temis, ĉar mi (laŭ devo) rigardis la publikon; ne gravas kiu estis; li rajtas esti defendita kontraŭ juĝo tiel hasta kaj senscيا.

Mi mem vere ne scias kiomfoje en mia vivo mi ekdormis pro ne-rezistebla laceco dum iu evento kiu tre interesis min.

Pli grave: multaj esperantistoj tute ne konstatas kiom da laboro kutime faras akademianoj kaj aliaj vere aktivaj esperantistoj, kaj kiom da diversaj devoj dum kongreso probable sieĝas tiujn personojn. Mi suspektas ke mia insultita kolego estas dediĉito

tiuhore elĉerpita, kiu tre eble ofere trenis sin al kunveno pro devosento, kiam li preferus ripozi.

Partoj de tiu kunveno fakte iom tedis min, pro laŭta dogmemo kaj mallarĝa trocerteco de kelkaj kiuj parolis. Sed, same kiel pri ies ekdormo, limigita scio ofte estas faktoro en diskutimuna memfido.

Marjorie Boulton (Britio)

Zamenhof: Diletanto aŭ genio?

B. Golden riproĉas al Zamenhof (jan., p. 8) ke li elektis la adjektivon *kurba* anstataŭ *kurva*, malsame al multaj eŭropaj lingvoj. Por pravigi sian riproĉon B.G. citas Zamenhof: "[...] la vortaron mi kreis ne arbitre, sed kiom eble el vortoj konataj al la tuta klera mondo. Tiel ekzemple la vortojn, kiuj estas egale uzataj en ĉiuj civilizitaj lingvoj [...] mi lasis tute sen ia ŝanĝo."

Zamenhof skribis "en ĉiuj civilizitaj lingvoj" kaj ne "en la plej multaj civilizitaj lingvoj". Sed eble B.G. konsideras ke la franca lingvo, kaj kelkaj aliaj lingvoj, ne estas civilizitaj. Krome, Zamenhof "kiom eble" elektis radikojn "el vortoj konataj al la tuta klera mondo": "kiom eble", sed ne devige. Mi do ne opinias ke li devias de sia principo.

Se Zamenhof ne elektis *kurva* pro la kialo donita de B.G. (ĉar ĝi sonas kiel pola vorto kiu signifas "prostituĉino"), tio ne estas vere lingva "mispaŝo". Ĉu oni ne povas konsideri ke en tiu epoko, kiam Esperanto estis atakata, li pravis kiam li ne volis doni kaŭzon por plia stulta atako?

Aparte ŝokis min la aserto de B.G. ke Zamenhof "estis nur diletanta poligloto", kaj tute ne "lingvisto" aŭ "genio". Laŭ PIV, *diletanto* "celas nur sian plezuron". Ĉu do "diletanto" ne estas insulto al la tuta sindonema vivo de d-ro Zamenhof, kies unua celo precize estis utili al la tuta homaro? Feliĉe ni estas multaj kiuj neniam diros ke Zamenhof estis diletanto. Maurice Suje, ordinara e-isto (Francio)

Artverko, ne mekanika kunmetaĵo

Kun miro mi legis la epitetojn per kiuj Bernard Golden dekoracias Ludovikon Zamenhof: “diletanta poligloto”, “sentiva prudulo”. Sin mem B. Golden tre laŭdas pro la solvo de la “enigmo” pri la formo de la radiko *kurb-*. Nu, eble por li tio estas malkovro, sed ĉiuj polingvanoj kaj ruslingvanoj (eble ankaŭ aliaj slavlingvanoj) scias ke en iliaj lingvoj la radiko *kurv-* signifas ion maldecan, kaj tial Zamenhof alprenis la formon *kurb-*, kiu ne estas arbitra, sed ekzistas en la franca lingvo.



Golden ...

Kaj kie estas la krimo? “Neniu kompetenta, faksperta lingvisto estus farinta tiun mispaŝon [...] [E]n ĉiuj internaciaj planlingvaj projektoj publikigitaj post Esperanto, la responda radiko estas *kurv-* aŭ *curv-*”. Nu, ĉiuj tiuj restis nur projektoj (eĉ se en ilia kreado partoprenis la plej famaj lingvistoj, kiel Otto Jespersen aŭ André Martinet), sed Esperanto kun sia “fuŝa” radiko *kurb-* transformiĝis en vivantan lingvon. La kaŭzo estas ke tiuj projektistoj agis mekanike laŭ dogmecaj principoj, dum Zamenhof agis kiel artisto, kreante kun inspiro artverkon, en kiun li enblovis animon.

Boris Kolker (Rusio/Usono)

Ne la sola mispaŝo

La “kurba mispaŝo” ne estas la sola de la kreinto de Esperanto. Zamenhof, kiu ne disponis pri solida metodo por la elekto de sia vortaro, prenis siajn vortojn pli aŭ malpli arbitre, ofte gvidata per intuicio. Ne estas mirige ke plurfoje li prenis maltaŭgan vorton aŭ formon. La “mispaŝoj” devenas ankaŭ de la fakto ke Zamenhof ne konsideris la ekziston de tutaj vortfamilioj en la internaciaj terminaroj scienca kaj teknologia. Laŭ tia konsidero, ekz. *lipo* devus esti *labio*, vorto kiu ekzistas en diversaj lingvoj kaj estas subtenata de derivaĵoj *labial*, *labiodental*, *labionasal* ktp en la internacia terminologio scienca.

Piet Cleij (Nederlando)

La kimero de goldena posedo

Laŭ B. Golden (feb., p. 32) absurdas paroli pri “plena posedo de Esperanto” fronte al la povra lingvokapablo de esperantistoj. Sed ni notu ke ajnlingve “plena posedo” absurdas. La esprimo supozigas nin pri ekzisto de “la” lingvo, dum lingvo efektive estas kunmetaĵo de diversaj variaĵoj dinamike interrilatantaj.

Laŭ la “pli rigore disciplinita rezonado pri la lingva situacio” kiun Golden postulas, Esperanto klasiĝas kiel unu el tiuj minoritataj lingvoj kies parolantoj baraktas alproprigi sian lingvon sub malfavoraj kondiĉoj: en la sino de alilingva medio, sen lingvotenaj lerneja sistemo kaj amaskomunikiloj. Jen makroskopa kialo por tiom da fuŝoj ĉe esperantistoj. Sen tia “rezonado”, Golden montriĝas nura kolektmaniulo de “plej diversspecaj lingvaj eraroj”.

La sinteno de nia mikroskopa akademiano memorigas al ni eksmodan profesoron de gramatiko, kiu pretendas posedi “la” lingvon kaj rajtigas sin vipi lernantojn ĉiam kiam ili stumblas. Ŝajnas ke la kimero de plena posedo ja loĝas en neniu alia loko ol la kapo de Golden men.

USUI Hiroyuki (Japanio)

Konsolo el Italio

Golden drakone deklaras ke *neniu en Esperantujo povas plene posedi la lingvon*. Nu, mi senhezite konsentas: Golden pravas, pravegas. (Ĉu iam li malpravas?) Mi povas nur aldoni ke, en mia lando, neniu plene posedas la italan. Aŭskultante en televido multegajn parolantojn, inkluzive de kleruloj, verkistoj, universitataj profesoroj k.s., mi regule kap- tas (kaj notas; jam plenigis kajerojn) ĉiuspecajn lingvajn erarojn. Do, ĉu ni konsoliĝu?

Aldo de'Giorgi (Italio)

Ideojn havas homoj, ne lingvoj

Csaba Székely (“Remi en sama boato bonas por la sano”, feb., p. 36) ĉagreniĝis pro mia studo “Pri la ‘interna ideo’ de Esperanto” (aperinta en *Sociopolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*, Budapest: HEA, 1978 kaj 1986, kiel broŝuro represetita de HEA, siatempe sen mia scio, 1982). Lian ĉagrenon mi sincere bedaŭras, des pli ĉar mi supozas ke li ne bone legis la studon. Pri liaj

diversaj ideoj, kiujn mi povus akcepti, mi ne komentos. Ĉi tie temu nur pri la “interna ideo”.

Mi nenie asertis ke la “interna ideo ne ekzistas”, sed ja, kompreneble, ke “Esperanto estas nur lingvo”. (Se Székely celas “malnur”, tiam li parolas pri la movado kun ties diversaj ideoj kaj celoj.)

Mi ja skribis multe pli. Mi montris ke la humanisma idealo de Zamenhof sen iu ajn dubo ekzistas kaj ĉiu humanisto ĝin nepre subtenas. Sed la ĉefa celo de mia studo estis montri ke neniam iu lingvo, sekve ankaŭ ne Esperanto, havas en si mem iun internan mistikan ideon aŭ forton. Ideojn kaj idealojn havas *la homoj*, kiuj per certa lingvo volas realigi ilin. Ke difinitaj homoj elektis lerni, apliki kaj disvastigi ĝuste Esperanton, povas atesti pri certa ekzisto de la menciitaj idealoj, kvankam ne nepre aŭtomate.

La motivoj por okupiĝi pri Esperanto estas tre malsamaj. Por multaj estas tio kion Zamenhof nomis “interna ideo de Esperanto”. Sed se oni volas atingi iom seriozan akcepton kaj subtenon en la neesperantista mondo, oni lasu la neseriozan babiladon pri la interna ideo. Oni ja povas paroli, interalie, pri tiuj alte estimindaj idealoj kiuj motivis Zamenhof al lanĉado de sia lingvo kaj motivas aŭ *kun-* motivas multajn (ankaŭ min mem) por labori por ĝi.

La humanisma mesaĝo kiun Zamenhof ligis al sia lingvo estas tre grava (kvankam ne la sola) kialo ke Esperanto ankoraŭ ekzistas kaj evoluas — sed tiu mesaĝo neniel sufiĉas por certigi la estontecon de la lingvo. Malovec (okt., p. 176) tute prave polemikas kontraŭ primitiva “finvenkismo”, postulante sobrelabori kaj ne altrudi. Sikosek (jul.-aŭg., p. 136) same prave atakas trajtojn de sektismo. Reagu tiuj kiuj sin sentas trafataj.

Sektisma konduto, troigoj, propagando per falsaĵoj aŭ duonfaktoj k.s. detruas multege el tio kion aliaj pene sukcesis konstrui.

Detlev Blanke (Germanio)

**SE VI NE SCIAS PRI IO,
NE KULPIGU ALIAJN!
→ Abonu al Eventoj!**

pk. 87. HU-1675 Budapest, Hungario



• Belgio: Sindikata kurso

Fine de januaro la regiona sekcio de Konfederacio de la Kristanaj Sindikatoj en Charleroi malfermis Esperanto-kurson por pli ol 20 sindikatoj. Sendu gratulon aŭ proponu sindikat-rilatajn interŝanĝojn al: s-ro Joseph Lippolis, CSC – Esperanto, 5, rue Prunieu, BE-6000 Charleroi, Belgio. (G. Pirlot)

• Francio: Muzeo solenas

La 26-an kaj 27-an de aprilo okazos memorsoleno de la 20-jariĝo de la Nacia Esperanto-Muzeo en Gray. Sendu gratulleteron al la urbestro: Hôtel de Ville, Pl. Charles de Gaulle, FR-70100 Gray.



• Csiszár kuras sola

Kvankam la longdistanca kunkurado anoncita en nia revuo (feb. '96, p. 37) ne okazis pro preskaŭ nula intereso de e-istoj, la 56-jara instruisto Ernő Csiszár (verkinto de la libro *Dulingve – pli simple*, pri denaska dulingva edukado de siaj infanoj) kuris pasintjare sola 250-kilometran distancon ĝis la hungara nacia memor-loko Ópusztaszer. Per tio li celis instigi gejunulojn al kuraĝaj entreprenoj kaj, je la 1100-a datreveno de la alveno de hungaroj en la nunan Hungarion, atentigi pri la graveco de historio. Pluraj gazetoj raportis, menciante lian e-istecon.

• Fighiera jubileas

La 68-jara Gian Carlo Fighiera festas en 1997 la 50-an jaron de sia agado por Esperanto. Konstanta kongresa sekretario de UEA de 1956 ĝis 1961, li poste kariere en la kampo de internacia turismo kaj kongres-organizado, fine kiel altranga oficisto de Monda

• Hispanio: Esperanta Tirano bombadas

Post plurmonata "bombado" pere de "Astro Jupiter", kanto el la disko *Esperanto* (vd. dec. p. 209), hispanaj radiostacioj rekomencis la kampanjon per la kanto "Tirano". Jen kovrilo de la "re-miksita" varianto, reklamcele dissendita de la eldoninto, Warner Music Spain. (M. Gutiérrez)



• Kroatio: Rememora koncerto

Kroatia E-Ligo organizis la 3-an de februaro en Zagrebo, en la plej prestiĝa artmuzeo Mimara, koncerton de la japanaj pianisto Megumi Sakaguchi kaj violonisto Masatoshi Hirano, de-

diĉe al la civitanoj de la urbo Vukovar rifuĝintaj al Zagrebo, kaj omaĝe al la poeto-kanzonisto René Matoušek, malaperinta en Vukovar novembro de 1991. La poezion de Matoušek, iama membro de Studenta Esperanto-Klubo, prezentis geaktoroj Vida Jerman kaj Kruno Šarić al la pli ol 200-kapa publiko. Radio Vukovar elsendis 45-minutan programon pri la koncerto. (S. Štimec)

• Svislando: Cignokanto en Lugano

En Kultura Semajnfino E-ista (Lugano, 15-16 feb.) instruis al lokaj interesatoj Cseh-metode Carla De Lorenzi, al progresintoj Nicole Margot kaj Alain Favre, dum al spertuloj akademiano Carlo Minnaja donis profundan, 6-horan kurson pri esperantigo de itala beleto. Giuseppe Valenti, profesia aktoro, prezentis sian unupersonan teatraĵon "La mondo-vojaĝo en 79 tagoj". Kvankam tradicia ekde 1974, la Semajnfino ne plu okazos pro intereso-manko. (T. Carlevaro)

Turisma Organizo. Li grave rolis en la rekono pri Esperanto en la fina deklaro de la Monda Turisma Konferenco (Manilo, 1980). Aktiva en la lokaj kaj landaj movadoj sinsekve en Torino, Bruselo, Madrido kaj ree Torino, Fighiera helpis dum 35 jaroj la redaktistan laboron de sia edzino Ada Sikorska (1929-1996) por *Heroldo de Esperanto*.

• Harry 80-jara

La 10-an de marto 80-jariĝis unu el la plej malnovaj Honoraj Patronoj de UEA, Ralph Harry. Dum sia longa kariero de diplomato kaj aŭstralia ambasadoro en multaj landoj, li neniam preterlasis okazon agadi en la Esperanto-movado diverslande kaj ne malofte signife helpis ĝin (ekz. en Singapuro kaj Suda Vjetnamio). Iama ambasadoro de Aŭstralio ĉe Unuiĝintaj Nacioj (1975-78), li tradukis, kun Ivo Lapenna kaj Eskil Svane, ties ĉarton en Esperanton, same kiel la statuton de Internacia Kortumo kaj diversajn traktatojn internaciajn. Lia leksikografia intereso fruktis la terminareton *Esperanto: lingvo de la sporto* (1972) kaj *Aŭstralia-Esperanta vortaro* (1990). Li vicprezidis Internacian E-Asociacion de Juristoj, prelegas en multaj E-kongresoj kaj -renkontiĝoj, kaj estas unu el la



En la 52-a UK (Rotterdam, 1967) Harry transdonas pluŝan kanguruon.

pilieroj de la aŭstralia E-movado. Multaj interesaj eroj de lia "verda vivo" legeblas en liaj rememoroj *Aventuroj en Esperantujo* (1994).

• Kawamura 100-jara

Naskita en oktobro 1896, KAWAMURA Seizirō estas probable la plej aĝa UEA-ano. Membriginte en 1951, li fariĝis tuj delegito, kaj restis tio eĉ ĝis 1994. Aktiva ankaŭ en SAT, Kawamura ankoraŭ ĉiusemajne instruas Esperanton al gejunuloj kaj foje partoprenas lokajn E-kunvenojn. La ĵurnalo *Kyōto Simbun* aperigis trikolumnan artikolon kun lia foto, en kiu li parolis pri sia vivo kun Esperanto. (*La Revuo Orienta, Sennaciulo*)

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Francio: Julien Ducrocq. Germanio: Elisabeth Schwarzer.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Usono: Dorothy Holland. AMIKOJ (minimumo \$10): Usono: Alex Tate; June Knudsen-Fritz; Stefan Slak.

PATRONOJ DE TEJO 1997

Belgio: Grégoire Maertens. Brazilo: Isolina da Silva Mundim. Britio: Adrian Vincent-Jones. Francio: Barbara Despiney; Jean-François Clet. Germanio: Maria Vitalyos. Hispanio: Francisco Belmonte Sánchez. Israelo: Jehosua Tilleman. Italio: Michela Lipari. Kanado: Brian D. Kaneen; Stevens T. Norvell Jr. Usono: E. Williger; D. Gary Grady; L.A. Walther; Rubén Feldman-González.

SOCIETO ZAMENHOF 1997

Argentino: Rodolfo G. Calógero. Belgio: A. Mertens Goossens; Luc Duchateau; Eliza Kehlet; Grégoire Maertens; Jean P. Bovy; Jos Vandebergh. Francio: André Gilles; Jeannine Croze; Jeanne Roy; Pierre Métivier. Germanio: Bruno Vogelmann; Elfriede Kruse. Hispanio: Josep Franquesa Solé. Israelo: Josifa Rabino. Italio: Clara Gubbioli Carioli. Japanio: Kazuko Kikusima; Nobuyuki Syôzi; Keiko Syôzi. Kanado: Brian D. Kaneen; Bruce R. Crisp; Stevens T. Norvell Jr. Nederlando: Sija van Wijngaarden; W.C. Keizer; Willy Keizer. Svedio: Sten Axel Broman; Malte Gahlin; Nils Gustav Johansson. Usono: Bruce Arne Sherwood; David Wolff; D. Gary Grady; Thomas H. Goodman; Milton O. Brown; Solomon D. Helfgot; Sidney S. Culbert.

DONACOJ 1997 (gld.)

ĝis la 28-a de februaro

Fondaĵo Ameriko: Brazilo: I. da Silva Mundim 133,00. Sumo ĉi-jara 133,00.

Fondaĵo Azio: Brazilo: M. P. Almada 18,52. Japanio: H. Abe 60,88; S. Aikawa 61,36; Esperanto-Densyusyo Sue 30,87; Esperanto-Rondo de Ehime 30,68; M. Hirota 30,68; T. Kawai 30,87; U. Kobayasi 304,40; Y. Kuroyanagi 61,36; E. Mitu 30,87; Y. Mizuno 183,07; S. Nagura 91,32; Y. Ootuka 30,44; R. Sasaki 30,44; K. Sasanuma 92,61; M. Takezaki 30,68; S. Yamamoto 30,87; Y. Yamasaki 46,31; K. Yano 30,44. Tajlando: F. Andreoni 100,45. Sumo ĉi-jara 1327,12.

Biblioteka Fondaĵo: Nederlando: R. Moerbeek 100,00; N. Moerbeek-Bartels 50,00; F. Zeiler 75,00. Sumo ĉi-jara 225,00.

Fondaĵo Canuto: Finnlando: S. Mynttinen 190,00. Francio: J.P. Angevin 33,20; B. Bourrut 23,24; P. Chavignon 16,60; R. Despujols 99,60; J. Ducrocq 249,00; C. Haren 36,52; R. Lebrun 33,20; J.-A. Metzeler 6,64; Y. Nicolas 29,88; T. Nowak 79,68; B. Robineau 46,48; J.-C. Trébouet 69,72. Nederlando: A. Beuzenberg 112,00; A.P.G. Ploeg 25,00. Slovenio: J. Židanik 100,00. Sumo ĉi-jara 2112,56.

Ĝenerala Kaso: Britio: B. Najbaro 3,24; A. Prent 60,80. Bulgario: B. Beleva 37,50. Italio: A. D'Attilio 19,90. Portugalio: W.T. Oeste 8,88. Usono: J.D. Borkowski 9,20; D.C. Halley 184,00; P. Ledeen 36,40; S.E. Sorenson 18,20; J.R. Vazquez 27,30. Svislando: 84,48. Sumo ĉi-jara 1405,78.

Konto Espero: Britio: A. Vincent-Jones 87,53. Francio: P. Chavignon 16,60; R. Despujols 99,60; J. Ducrocq 332,00; R. Durand 33,20; C. Haren 36,52; P. Pila 166,00; J.-C. Trébouet 16,60. Sumo ĉi-jara 1932,17.

Propaganda Konto: Italio: S. G. Delcarmin 9,06. Sumo ĉi-jara 9,06.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Nederlando: A.P.G. Ploeg 25,00. Sumo ĉi-jara 25,00.

Volontula Fondaĵo: Japanio: W. Schmid 30,00. Nederlando: A. Beuzenberg 100,00; F.J. Pieterse-Kruger 100,00; A.P.G. Ploeg 25,00; A. Wester van der Veen 10,00. Sumo ĉi-jara 310,00.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

VIZITU VIAN PROPRAJN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176
EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 19-an de aprilo 1997 (10h00 - 17h00)

★ Nora Bartels prezentos sian tradukon de *TAGLIBRO DE ANNE FRANK*

★ Esperantaj vidbendoj montrataj

★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%

★ Specialaj ofertoj



Speciala gasto:
Fino BARLSTON

★ Senkosta loterio

★ Bazaro de esperantaĵoj

★ Kafo kaj teo senpagaj

NEKROLOGOJ

Catina DAZZINI (1917-1997) forpasis la 17-an de februaro en Massa (Italio). Doktoriginte pri beletrio en



Catina Dazzini

Florenco (1940), ŝi instruis en liceo ĝis pensiigo en 1982. Esperantisto ekde 1953, ŝi estis fakdelegito pri edukado (kaj poste pri filatelo) 40 jarojn, de 1976 ankaŭ loka delegito, kaj dum la lastaj 20 jaroj ĉefdelegito por Italio — funkcio kiun ĝis 1974 plenumis ŝia frato, la multflanka aktivulo Mario Dazzini. Post la forpaso de Mario ŝi postsekvis lin ankaŭ kiel sekretario de Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj (1985-88), kies italan sektion ŝi estris de la 60-aj jaroj ĝis 1996. Ŝi gvidis en Massa la lokan E-grupon kaj E-kursojn. En 1994 ŝi organizis solenan transdonon, al la Ŝtata Arkivo en Massa, de la 6250-voluma E-kolekto fondita de ŝia frato kaj poste flegita de ŝi. Tio signifis ekeston de nacia Esperanto-biblioteko prizorgata de la itala ŝtato. Ŝi estis konstanta vizitanto de UK-oj.

Evert HAVERSCHMIDT (1925-1997), iama delegito pri notariaj aferoj kaj eksa estrarano de Instituto Hodler, mortis la 6-an de februaro en Hago.

Jelena LEBEDEVA (1965-1997) mortis post turmenta malsano la 26-an de februaro en Moskvo. Esperantisto ekde 1981, ŝi estis dum jaroj unu el la ĉefaj motoroj de la junulara Esperanto-movado en Sovetio kaj Rusio. Ŝi agadis en ties tutlanda organizo SEJM kiel komitatano (1988-92), kaj internacie en TEJO kiel estrarano pri kongresoj kaj komitatano (1993-95). Ŝi kunorganizis multajn Esperantenkontiĝojn, i.a. Rusian Esperantistan Kongreson en Kolomna (1991) kaj Internacian Junularan Kongreson en Sankt-Peterburgo (1995), kies partoprenantoj elektis ŝin reĝino de la kongreso. Sen Lena ne okazus en 1994 "La Granda Trajnvojaĝo" el Moskvo, tra Siberio, al la IJK en Koreio, intensa kaj neforgesebla sperto por la trideko da partoprenintoj. Studinte historion, Lena fariĝis pasintjare delegito pri eldonado kaj historio.



Jelena Lebedeva

Eileen F. OLSEN (1925-1996), delegitino pri fervojoj kaj turismo, forpasis antaŭ kelka tempo en Masterton (Nov-Zelando).

Christiaan M.N.T. OP 'T ROODT (1905-1996), UEA-membro pli ol kvindek jarojn, emerita statistikisto, delegito ekde 1952 pri laktoproduktado, poste pri mondfederismo, mortis la 17-an de novembro en Rijswijk (Nederlando). Li estis aktiva en Universala Ligo.

Adomas VAITILAVIČIUS (1915-1996), dum pluraj jardekoj la plej elstara figuro de la litova E-movado, mikrobiologo, mortis la 19-an de decembro en Vilnius. Li lernis Esperanton el libro de sia onklo en 1932, kaj samjare ekverkis por E-revuoj. Pli vaste li ekagis fine de la 50-aj jaroj,



Adomas Vaitilavičius

vajn lingvanojn, gvidis Esperanto-kursojn, instruis tradukistojn kaj mem tradukis litovan literaturon, ekz. la fabelaron *Koko kantisto kokerikisto* (1988). Li kompilis ĉiujn dek kajerojn de la almanako *Horizonto de Soveta Litovio* (1970-71, 1979-87), redaktis post ties revivigo la riĉ-enhavan revuon *Litova Stelo* (1991-94), verkis

post 17-jara paŭzo trudita de stalinismo. Prezidanto de la Vilnusia E-klubo tri-dekon da jaroj, li prelegis, artikolis, informadis per televido kaj radio, edukis multajn no-

velojn kaj poemojn (ankaŭ sub pluraj pseŭdonimoj) kaj publikigis ducenton da esperantologiaj eseoj, kies planita envolumigo ne efektiviĝis pro manko de rimedoj. En 1994 aperis lia E-lernolibro por litovoj. Li redaktis la dudirektan E-litovan vortaron (1988) de K. Puodėnas kaj la terminaron *Internacia poŝtservo* (1996) de A. Piliponis. Estrarano de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj ekde ties fondo (1979), de la sama dato li vicprezidis ties litovan filion, kaj de 1989 la restarigitan Litovan E-Asocion. Li partoprenis kvin Universalajn Kongresojn, prelegante en la Internacia Kongresa Universitato en Varsovio (1987), kaj preskaŭ ĉiujn tridek Baltajn E-Tendarojn, el kiuj li mem organizis la plejparton de la litoviaj BET-oj, same kiel, ekde 1980, la kulturajn konkursojn "Muzoj". Vaitilavičius estis delegito en Vilnius, fakdelegito pri esperantologio kaj pri mikrobiologio.

Li Hajpin (1917-1997)

Li Hajpin, Honora Membro de UEA ekde 1985, forpasis la 24-an de februaro en Anyang (Koreio), kie li estis antaŭe delegito.

Laŭ sia vera nomo Yi Chaehyon, Li naskiĝis la 2-an de februaro 1917 en Seulo, sed ekde 1920 vivis en Ĉinio. Aktiva en la movado por Koreio sendependa de Japanio, li eklernis Esperanton aŭtune de 1935 en Ŝanhajo, de la ĉina pioniro Elpin. (Tiutempe en Koreio, pro la neeblo ĉiutere uzi sian lingvon, multaj patriotoj de la t.n. nacasava movado simpatiis kun e-ismo.) Li baldaŭ kunlaboris kun la E-klubo de Universitato Sun Jatsen kaj kontribuis al la revuo *Orienta Kuriero* (1938-39).

Post reveno al Seulo (1946) li organizis kaj gvidis E-kursojn en la universitatoj de Seulo kaj Sansu kaj, post la sendependiĝo de Koreio (1949), starigis E-klubon en Pusan, kie li plu gvidis E-kursojn. En 1951 aperis lia

Esperanto-lernolibro. Ekde tiu jaro li kompiladis sian *Esperanto-Korea Vortaro* (1969), kiun en 1983 sekvis *Korea-Esperanto Vortaro*. Laborante en Vjetnamio inter 1966 kaj 1974, li helpis ankaŭ la tiean E-movadon.

Alte taksata kiel la plej granda Esperanta literaturisto en Koreio, Li kontribuis al *La Espero el Koreio* kaj aliaj

Esperanto-revuoj, kaj krome eldonis du kolektojn de originalaj eseoj kaj verkoj tradukitaj (*Eseo tra la kamparo*, 1977; *Korea eseoj, noveloj kaj popolkontoj*, 1987), kiujn li konsideris kiel "sojlon de la Korea Antologio".

Li Hajpin estis grava gvidanto de Korea Esperanto-Asocio, vicprezidanto ekde 1983, kaj gvidanto de ties ekz-

mena komisiono kaj lingva komitato dum multaj jaroj.

En sia eseo *La vivo* Li skribis: "La agoj kaj kondutoj de la vivado similas al la strekoj de la pentrista plumo. Nur post la lasta streko, fina tuŝo, oni povas decidi kia verkaĵo ĝi estas." La vivo de Li Hajpin konstituas bildon varian kaj kompletan.



Li Hajpin

LA PLEJ KONATA LIBRO
PRI EFIKA TEMPOUZO,
NUN EN ESPERANTO!

Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado

Roterdamo: UEA 1995. Serio *Konsilaroj por Aktivuloj*
n-ro 2. 53 p. Prezo: 7,50 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.



En 1996 250 esperantistoj subtenis
la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de
mecenatoj de UEA. Vi ricevos leterojn de la
prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK
kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en
1996 estis bela SZ-globkraĵono. La
kotizon (duoblo de MA por via
lando) vi povas pagi al via peranto
aŭ rekte al UEA.



FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu **patrono de TEJO**

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas
la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- *TEJO tutmonde* (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokkazajn servojn kaj publikigaĵojn.

Fondaĵo Canuto

*Multaj arde deziras membriĝi
en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via
donaco al Fondaĵo Canuto helpas
nin teni la kontaktojn kun tiuj,
kiuj suferas pro transpagaj baroj.
Antaŭdankon pro via solidareco!*

SOLENA SESIO, 14/04/97

Omaĝe al Esperanto la Ĉambro de Deputitoj de Federacia
Distrikto de Brasilia, proponas de Deputito Renato Rainha,
okazigos solenan sesion en tiu dato, senprecedenca realigo
kiun la tutmonda esperantistaro, ties amikoj kaj familianoj
bv. amase per dankleteroj saluti, menciante la nomon de
la sukcesinta Deputito. Brazila Esperanto-Ligo iniciatis ĉe
la Sekretariejo de Eduko de DF prizorgon por ebligi al
profesoroj instrui Esperanton, ankaŭ enkondukatan en la
Akademio de Civila Polico kaj Centro Interlerneja de Ling-
voj. Adreso por la mesaĝoj: Deputada Lúcia Carvalho,
M.D. Presidente da Câmara dos Deputados, SAIN, Parque
Real, Brasilia, DF. BR-70086-900.

Ĉi-somere haltu ĉe

UNIVERSITATO DE HARTFORD

Usono

por la tradiciaj

SOMERAJ ESPERANTO-KURSOJ

6-11 julio 1997

Partoprenu mezgradan kaj altnivelan intensajn kursojn
kun instruistoj

SPOMENKA ŠTIMEC
DOROTHY HOLLAND
JOSEPH CONROY
HUMPHREY TONKIN

sur la bela antaŭurba tereno de la Universitato
de Hartford en la ŝtato Connecticut.

Komforta loĝado en studentaj domoj por la tuta semajno,
plus kurso: US\$ 325.

Okazos ankaŭ elementa kurso por anglalingvanoj
je sama prezo.

Skribu angle aŭ Esperante al:

Office of Summer Programs, University of Hartford
200 Bloomfield Avenue
West Hartford CT 06117-1599, Usono
☎ +1 860-768-4401 ☎ +1 860-768-5160
✉ tonkin@uhavax.hartford.edu



Patrino koro

*Simplaj, romantikaj
rakontoj pri la
esperantista vivo*

Nevena Nedelčeva. Rotterdam / La
Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eld./
pres). 148p. 17 cm. Prezo: 12,00 gld.
Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Alain Fournier

La granda Meaulnes

*Fama priskribo de pura amo.
La sola verko de la aŭtoro,
kiu mortis nur 27-jara.*

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo,
1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: 22,50 gld.

La Bildstria Gvido al Genetiko

Jen ĉio, kion vi volas scii pri genetiko kaj gentekniko. Laŭ *Eventoj*, "pro la ĉarmaj desegnaĵoj kaj intereso-streĉa teksto la libro apenaŭ estas flanken-metebla, se iu komencis ĝin legi." Verkis Larry Gonick kaj Mark Wheelis. Tradukis Sung Ho Cho. 1996. 216p. 22cm. Mendu ĉe UEA kontraŭ 27,00 gld.



Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

KŜIAKTO

estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KŜIAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1997 **KŜIAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1997

Aŭstralio	28 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	38 guldenoj
Aŭstrio	240 ŝilingoj	Germanio	34 markoj	Norvegio	140 kronoj
Belgio	700 frankoj	Hispanio	2100 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	29 guldenoj	Portugallio	2400 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	31000 lirej	Svedio	150 kronoj
Danio	130 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	100 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. *KSM* transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. *KSM* estas servo de UEA.



KSM

Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6
FR-55000 Longeville-en-Barrois
Francio

SIMPLE LA PLEJ BONA!

SESA ELONO
DE LA
INTERNACIA
LERNOLIBRO



Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: 24,00 gld.
Sonkasedo: 12,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

La 84a Japana Esperanto-Kongreso

tempo: 1997-08-09 (sab.) ~ 10 (dim.)

loko: urbeto Ikeda en la gubernio Tokuŝima

kotizo el eksterlando: 10,000 ¥ (surloke)

La sumo inkluzivas partoprenon, 2 tranoktojn,
2 maten- kaj vespermanĝojn.

Informojn petu de **Japano Esperanto-Instituto:**

JP-162 Tôkyô-to Sinzyuku-ku Waseda-mati
12-3, Japanio

☎ +81-(0)3-3203-4581 📠 +81-(0)3-3203-4582

aŭ per komputila reto:

shigeaki@pm.tokushima-u.ac.jp

hejma paĝo:

<http://sun.pm.tokushima-u.ac.jp/~shigeaki/>

La urbeto Ikeda situas centre de la insulo Ŝikoku. Ĝi estas urbeto riĉa je la naturo.

Viaj partoprenoj estas atendataj por variigi la programon.